Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 26 - trimonata **2/96**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktoro: Jozefo NÉMETH

Vicredaktoro: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunlaborantoj: Stefan MacGILL, Johano KIRSCH, Françoise NOIREAU, Atilio ORELLANA ROJAS kaj Franz-Georg RÖSSLER

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Willeman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

IPR

Redaktejo: NÉMETH József
HU-8500 Pápa, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

Till DAHLENBURG: Rimedoj por bona lernado kaj memlernado de E-o.....1
Sylla CHAVES: Baza didaktika minimumo.....3
F. Garcia BLÁZQUEZ: Didaktikaj problemoj en la instruado de korelativoj...8
Carla DE LORENZI: Konsideroj pri Mazi – instrucele.....9
Georgo MACIOSZEK: Por la suferanta komencanto.....11
El niaj metiejoj: Odette SCHEIDEL: Kukola ovo.....14
El la landoj kaj sekcioj.....15
Reagoj (L. Gados, H. Fechler, F.G. Rössler, M. Sadler).....26
Leterkesto (E. Perevertajlo, F. Popa, D. Blanke, F. Cobben).....30
Por via notlibro.....32
Recenzoj (Stefan MACGILL, Mike SADLER, Françoise NOIREAU).....34
Postparolo (Jozefo NÉMETH).....36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122.
Internet: charters@csc1.prin.edu.
Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado.
Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio.
Tel. (385 1) 576092. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj ne-faka programo.*
Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby.
Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*
Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio.
Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.
Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio.Tel. (49 38483) 528. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*
Membro: Brunetto Casini, Casella Postale 213, I-56100 Pisa, Italio
tel. 39 50/48 670, fakso 39 50/50 05 85
Membro: Mag. Atilio Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, AR-5000 Córdoba, Argentino. Tel. +54-51-517982. *Konferencoj.*
Estrara komisiito: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303.
Eksteraj rilatoj, instruado de infanoj.
Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342.
Gimnazio de ILEI. Servoj al instruistoj, trejnado de instruistoj.
Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz. 9/2, HU-2030 Érd, Hungario.
Eldonado
Observanto (UEA): Renee Triolle, 4 impasse des Charpentiers, F-57100 Thionville, Francio

Till Dahlenburg

RIMEDOJ POR BONA LERNADO KAJ MEMLERNADO DE ESPERANTO

– Temo de la 30-a ILEI-Konferenco okazonta en Tábor, Ĉeĥio –

Kiom da asocioj elvokas jam la unua vorto de la kadra temo por nia ILEI-Konferenco en la nuna jaro!!!

Asocioj pure etimologiaj aŭ eventuale pseŭdoveraj: medio, mediti, mediumo, medicino, medikamento, medalo, Meduzo...

Rimedoj ekzistas ja diversutiligeblaj – rimedoj por atingi ion bonan (kio ofte pli poste evidentiĝas malbona laŭ la proverbo „per tro multa varto malboniĝas la farto"), rimedoj por ripari ion malbonan (kaj per tio eble oni sukcesas nur „salti el la pato en la fajron"), rimedoj en formo de moneroj aŭ adorataj valutoj, helpe de kiuj oni povus permesi al si kelkajn eksterordinaraĵojn (se oni estas sufiĉe antaŭvida kaj konsideras la popolan sperton „tapiŝon deziris, maton akiris") – do, entute svarmo da eblaj ideoj, teknikaĵoj, sintenoj aŭ celoj kaŝas sin sub la mistera vorto „rimedoj".

La kaoso koncerne la pravan komprenon de la signifo plidensiĝas, se ni allasas interpretadon de la vorto flanke de germanlingvanoj: ilia traduko per „Mittel" ja substrekas la helpan rolon de ĉiuj rimedoj, kiuj funkcias kvazaŭ nur kiel „mediatoroj", kiuj staras „meze" inter, ni supozu, du partneroj.

Kaj Zamenhof tute konscie kunfandis la diversajn eblajn signifojn, kiel estas atestite en la „Etimologia vortaro de Esperanto":

> *„En la fontolingvoj la vorto signifas 'kuracilo, ...help(il)o[1]; Zamenhof plivastigis la sencon ĝis 'tio, kio servas por atingi celon, eble laŭ modelo de germana Mittel'..."*

„Kiu kaptas tro vaste, konservas malmulte" – oni diras. Pro tio ni flankenlasu la ĝeneralan uzon de la vorto „rimedo" kaj informiĝu pri ĝia tre limigita signifo en la faka lingvo de metodikistoj:

Tie sub la nocio „rimedoj" estas komprenendaj specifaj lern- kaj instruhelpiloj, kondukantaj bonvoleman lernantaron al spontanea fremdlingva reago. La aludita specifeco de la „rimedoj" konsistas en ilia „indiĝena aŭtentikeco" rilate la prezentatan lingvon en ĝia ĉiutaga uzado flanke de diversaj tipaj membroj de la lingva komunumo kaj inkludas, kompreneble, ankaŭ la tiel nomatan „malgrandan kulturon" – kutimojn, gestojn, trajtojn, parolturnojn k.s.

Resume – la „rimedoj" kvazaŭ anstataŭas originan parolanton en, por la partnero-lernanto, tuj rekoneblaj, ne miskompreneblaj lingvaj situacioj postulante de la partnero tujan, adekvatan fremdlingvan reagon.

Ĉu sufiĉas por vi tiu ĉi klarigo? Ĉu vi nun povus nomi kelkajn „rimedojn", kiuj posedas la forton envolvi unuopan lernanton aŭ eble tutan grupon da lernantoj en vivoplenan interkomunikadon? Ĉu vi estas konvinkita, ke el tio rezultas bona lernado, eĉ bona memlernado de Esperanto?

„Valoras ne la vesto, valoras la enesto" – eble estas via respondo al mia demando, kaj vi memoras renkontiĝojn kun esperantistoj, kiuj seniluziigis vin pro la konstato, ke ankaŭ „samideanoj" ne aŭtomate estas niaj „gefratoj", ke brila lingvoregado ne nepre signifas interhoman harmonion aŭ almenaŭ pretecon respekti eble kontraŭdirajn konvinkojn.

Do – kio estu „bona lernado, bona memlernado"? Ĉu nura enprofundiĝo en la lingvajn fenomenojn helpe de lingvoaplikigaj rimedoj sen konsidero de eventuale ligitaj kun Esperanto internideaj elementeroj?

Ĉu ne estus pli certige reiri al la ĝenerala signifo de la vorto „rimedo", kiu ja celus ankaŭ – eble prioritatan – kuracan efikon kontraŭ io malbona?

Kaj la malbono en nia mondo estas la plietendiĝanta malvarmo en interhomaj rilatoj, stimulata de nete kostkalkulanta enordigo de la homaj fortoj, korpaj kaj mensaj, eĉ animaj, koraj, spiritaj.

„Al farun' malbonspeca ne helpos la spico" – oni diras, kaj ĉu nia Esperanto estu altrudata al ia nerimorsema socio, nur por pliampleksigi ĝian utilitarisman strebadon?

Rimedoj por bona lernado kaj memlernado de Esperanto – kiu do estu bona esperantisto, ĉu tiu, kiu perfekte regas la lingvon, aŭ tiu, kiu intencas obeeti internideajn defiojn?

Tiom da problemoj! Kiom da respondoj kaj rimedoj?

Till Dahlenburg,
Feldstraße 13, D-19412 Brüel/Meckl., Germanio

Cseh-Seminario en la grado C-diplomiga
kadre de la 30-a ILEI-Konferenco

Kadre de la Konferenco en Tábor Internacia E-Instituto (IEI) organizos C-Seminarion por studantoj de Cseh-metodo en la grado „B". Komence de C-Seminario la studantoj faros finekzamenon de B-Seminario.

La partoprenkosto por tiu ekzameno estas 10 NLG. Partopreno en C-Seminario kostas 70 NLG. Interesitoj petu informojn de IEI (Riouwstraat 172, NL 2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. +31 70 355 6677). Oni povas anticipe pagi la sumon menciitan en NLG per poŝtmandato aŭ pere de UEA-konto: iein-q. Pagoj eblas ankaŭ surloke.

Kadre de la Konferenco estos starigataj laborgrupoj; unu el ili pritraktos la utiligeblecojn de la instrufilmo Mazi en Gondolando.

Estas dezirinde, ke la membraro aktive kontribuu en la programo kaj de la Konferenco kaj de la Tago de la Lernejo dum UK. Ĉiujn sinproponojn oni direktu al mi.

Atilio Orellana Rojas, estrarano

Sylla Chaves

Baza didaktika minimumo

Propono kaj pravigo de 700-morfema listo

Resumo de magistriĝa laboraĵo de Josef Dörr aperis en la unua numero de IPR en 1994 kaj unu jaron poste ankaŭ en LA LAMPIRO de E-Asocio de San-Paŭlo. La aŭtoro komparas tri ofteco-listojn en Esperanto (tiujn de Blaas, Dietze kaj Tišljar) kaj la vortojn prezentitajn en 12 „vaste uzataj lernolibroj" de 12 el niaj „plej gravaj pedagogoj". Li konkludas, ke inter ili „ne ekzistas konsento pri la baza vortprovizo de Esperanto cele al instruado" kaj ke urĝas la ellaboro de iu BAZA DIDAKTIKA MINIMUMO (BDM) por ke nia internacia lingvo restu kohera kaj unueca.

Mi reagas pro tri kialoj. Unue, ĉar mi estas unu el la analizitaj pedagogoj pere de mia verko LIBERA EKFLUGO, kaj tiun inkludon mi dankas. Due, ĉar mi trovis en la grava laboraĵo de Dörr kelkajn facile korekteblajn malĝustaĵojn. Kaj trie kaj ĉefe, ĉar miaj antaŭaj laboroj pri tiu temo permesas, ke mi nun proponu 700-morfeman liston, kiu povas fariĝi la celata BDM.

Tiu ĉi listo estas la unua el kvin, kiujn mi baldaŭ aperigos en libreto kun la nomo BAZA ESPERANTA VORTPROVIZO (BEV). Ĉiuj kvin listoj estas 700-morfemaj, kaj sekvas malkreskantan ordon de graveco, facileco kaj ofteco. Per ili mi respondas al malnova pledo de K. Kalocsay, kiu iam skribis: „Devas ekzisti limita vortprovizo, la TRUNKO de la lingvo. Ĉiu, kiu volas uzi la lingvon nur por ĉiutagaj bezonoj, devas koni tiun ĉi lingvo-trunkon... alie li riskas miskomprenon." (Lingvo-Stilo-Formo, 1931, p.51.) Mi opinias, ke senstumbla parolo, eĉ nur por ĉiutagaj bezonoj, postulas la 3500 morfemojn, kiujn mi prezentos kaj pravigos. Jene mi prezentos nur la unuan el tiuj listoj, kaj tiel mia argumentado povas esti resuma, mallonga kaj malprofunda.

Estas du tipoj de facile korekteblaj malĝustaĵoj en la verko de Dörr: la nekonsidero de strukturaj morfemoj kaj la kuna analizo de heterogenaj listoj. Li asertas, ke „la 205 strukturaj morfemoj... apartenas nepre al la baza didaktika minimumo (BDM)". Tute ne! Atenta komparo de la Baza Radikaro Oficiala de la Akademio (A) kun la listoj de la revuo Kontakto (K) kaj de Tišljar el Zagrebo (Z) evidentiĝas, ke strukturaj morfemoj, kiel FI, -INGO, MIS-, NENIES kaj PRETER ne apartenas al la sama nepra minimumo de KAJ, -ISTO, MI, RE-, kaj TIO, multe pli gravaj, facilaj kaj oftaj.

Dörr analizis kune morfemojn en niveloj elementa, meza kaj supera. LIBERA EKFLUGO, ekzemple estas tri-nivela legolibro kun tri morfemolistoj. Se la intenco de Dörr estis labori cele al la farado de iu BDM, li devus esti

preninta nur la unuan (712-morfeman) liston. Li tiel ne trovus „eĉ ne-PIV-ajn" vortojn pri ekster-eŭropaj realaĵoj. Tiaj vortoj troviĝas en mia supera nivelo. Kaj mia intenco en tiu nivelo estis ĝuste tio, ke la Esperanta vortprovizo akiru iomete pli da tutmondeco. Tiuj ĉi korekteblaj malĝustaĵoj ne forprenas la valoron de la laboraĵo de Dörr. Kaj mi ŝuldas al li mian emon proponi ĉi tiun BDM, kaj ankaŭ, konsekvence, pli ampleksan kaj pli gravan BEV, kiu baldaŭ aperos.

Evidente estus taŭge decidi pri Esperanta vort-ofteco surbaze de komputila pritrakto de almenaŭ milion-vorta samplo, same kiel faris interesitoj pri la lingvoj angla kaj germana. Sed niaj revoj kaj planoj devas esti proporciaj al niaj rimedoj. Kaj ni devas konstati, ke eĉ riĉuloj ofte prenas gravajn decidojn surbaze de malgrandaj samploj, kiam la situacio tion postulas. Ekzemple, pri aidoso kaj trafik-akcidentoj: oni ne atendis la milionan viktimon por ekzorgi pri kondomoj, sangotestado kaj seĝozonoj.

Konsiderante la urĝan neceson havi interkonsenton pri BDM, por ke nia lingvo ne diseriĝu en regionajn dialektojn aŭ skolajn ĵargonojn, ni devas nun forgesi la revatan „samplegon" kaj tuj agi. Tiucele, realisme kaj objektive, mi prenis la tri plej gravajn ofteco- kaj facileco-listojn nun ekzistantajn en Esperanto - kiujn mi ĉi-supre nomis A, K kaj Z - kaj uzis ilin por mia laboro.

A (la BRO de la AKADEMIO) estas mem kunfando de naŭ aliaj listoj, inter ili tiu de Blaas, kiun Dörr uzis. El A mi prenis nur la 522 morfemojn el grupoj 1 ĝis 4, tio estas, tiuj aperintaj en almenaŭ ses el la listoj, sur kiuj BRO baziĝas. K estas la litero de la junulara revuo KONTAKTO, kiu agis laŭ KUNDECIDO de pluraj verkistoj. El K mi prenis nur la 520 morfemojn, kiujn ili konsideris facilegaj. Per Z mi memorigas samtempe ZLATKON Tiŝljar kaj lian ZAGREBAN grupon. Ĝi rilatas al magnetofona kaj komputila esploro, el kiu mi prenas nur la statistike plej fidindan parton: la 454 morfemojn aperintajn almenaŭ 7-foje en la magnetofona registrado.

Kombinante la 552 morfemojn el A kun la 520 el K kaj la 454 el Z oni alvenas al la jeno: 1) 712 morfemoj aperas en almenaŭ unu el ili kaj 2) 324 morfemoj aperas samtempe en ĉiuj tri. El la 712 mi forprenis 12, kiuj nur aperis pro tendenco, kiel ekzemple lokoj kaj temoj de la sonbendigoj: FRANKO, STATUTO, PROTOKOLO kaj aliaj. Kaj al la 324 komunaj morfemoj mi aldonis pliajn 26, kiuj estas for pro simpla hazardo aŭ ŝanĝebla decido, kaj meritas esti tie, kiel ekzemple -ANTA, -ITA, KURI kaj TIAL.

Rezulte, mi proponas BDM kun 700 oftaj kaj facilaj morfemoj. Ĝia duono konsistas el 350 morfemoj oftegaj kaj facilegaj. En ĝi eblas ankaŭ apartigi 200 morfemojn, kiel prioritatajn. Resume, la konsisto de mia BDM estas la ĉi-suba (substreko: prioritataj 200, minuskloj: aldonaj 376, majuskloj: plej gravaj 324):

		* strukt.	ne-strukt.	Totalo	Ekzemploj	
1) Oftegaj	prioritataj	136	64	200	TIO*	PAROLI
kaj	ankaŭ en A, K kaj Z	8	116	124	NENIAM*	ESPERI
facilegaj	aldonaj	24	2	26	baldaŭ*	kuri
2) Aliaj oftaj kaj facilaj		12	338	350	nenie*	verda
	Totalo	180	520	700		

La ok ekzemploj en tiu tabelo taŭgas por montri la signifon de asterisko, substreko kaj grandaj kaj malgrandaj literoj en nia listo.

-A*
-aĉ-*
AĈETI
-AD-*
adreso
aero
afabla
AFERO
agi
agrabla
aĝo
ajn*
-AĴ-*
AKCEPTI
akvo
AL*
ALIA
almenaŭ*
ALTA
AMI
amaso
ambaŭ*
AMIKO
-AN-*
angulo
ANKAŬ*
ANKORAŬ*
anstataŭ*
-ant-*
ANTAŬ*
aparato
APARTA

apenaŭ*
APERI
aprilo
apud*
-AR-*
aranĝi
arbo
arto
artikolo
-AS*
asocio
-at-*
ATENDI
atenta
AŬ*
aŭdi
aŭgusto
AŬSKULTI
aŭto
aŭtobuso
aŭtomobilo
aŭtuno
avo
baldaŭ*
bati
batali
bazo
bedaŭri
BELA
besto
BEZONI
BILDO
bileto

birdo
blanka
blua
bo-*
BONA
bordo
brako
brili
brui
bruli
buŝo
CELO
CENT*
CERTA
ĈAMBRO
ĉapelo
ĈAR*
ĉarma
ĈE*
ĈEF-*
ĉevalo
ĈI*
ĉia*
ĈIAM*
ĉie*
ĉielo
ĈIO*
ĈIRKAŬ*
ĈIU*
ĈU*
DA*
DANKI
DAŬRI

DE*
decembro
decidi
DEK*
dekstra
DEMANDI
dento
DEVI
DEZIRI
dio
diablo
difini
dika
dimanĉo
DIRI
direkti
DIS-*
diskuti
DIVERSA
DO*
doktoro
dolĉa
doloro
DOMO
DONI
DORMI
DU*
dubi
DUM*
-E*
-EBL-*
-EC-*
EĈ*
eduki

EDZO
-EG-*
-EJ-*
EK-*
ekskursi
EKSTER*
EKZEMPLO
EL*
ELEKTI
-EM-*
EN*
erari
ESPERI
ESTI
-ESTR-*
-ET-*
eventuala
FACILA
fajro
fako
fakto
fali
FAMILIO
FARI
februaro
feliĉa
fenestro
fero
FERMI
festi
filo
filmo
FINI

fingro
fiŝo
FLANKO
floro
flugi
FOJO
FOR*
FORGESI
FORMO
FORTA
frapi
FRATO
fraŭlo
fremda
FRUA
frukto
funkcio
fuŝi
gaja
gajni
gazeto
GE-*
glaso
GRANDA
gratuli
GRAVA
grupo
gvidi
ĝardeno
ĝenerala
ĜI*
ĜIS*
ĝoji
ĜUSTA

ha!*
halti
haro
HAVI
HEJMO
hela
HELPI
HIERAŭ*
historio
ho!*
HODIAŭ*
HOMO
HORO
hotelo
hundo
-I*
IA*
IAM*
-id-*
IDEO
IE*
-IG-*
-IĜ-*
-IL-*
ILI*
imagi
-IN-*
-IND-*
INFANO
informi
instrui
-int-*
INTER*
INTERESI
interna
inviti
IO*
IOM*
IRI
-IS*
-ism-*

-IST-*
-it-*
IU*
-J*
JA*
JAM
januaro
JARO
JE*
JEN*
JES*
julio
JUNA
junio
justa
ĵaŭdo
ĴETI
ĵus*
KAJ*
kalkuli
KAMPO
KANTI
kapo
kapabla
KAPTI
kara
karoto
karto
kaŝi
kato
kaŭzo
kazo
KE*
KELKA
KIA*
KIAL*
KIAM*
KIE*
KIEL*
kies*
KIO*
KIOM*

KIU*
KLARA
klaso
klopodi
klubo
KNABO
kolo
kolekto
koleri
koloro
KOMENCI
komerci
komitato
KOMPRENI
komuna
KONI
konduki
kongreso
konkreta
KONSENTI
KONSILI
konstrui
kontakto
kontenta
KONTRAŭ*
kontroli
koro
korpo
korto
KOSTI
kovri
KREDI
kreski
krii
KROM*
KUIRI
kulturi
KUN*
kuri
kuraĝa
kurso
kuŝi

kutimo
kvankam*
KVAR*
kvazaŭ*
KVIN*
LA*
LABORI
laca
lago
lakto
LANDO
larĝa
LASI
LASTA
laŭ*
lavi
leciono
LEGI
LERNI
letero
LEVI
LI*
LIBERA
LIBRO
LIGI
ligno
LINGVO
linio
lito
literaturo
LOĜI
LOKO
LONGA
LUDI
lumi
lundo
majo
MAL-*
MANO
MANĜI
maniero
MANKI

maro
mardo
marko
marto
maŝino
MATENO
materialo
MEM*
membro
MEMORI
merkredo
METI
metodo
MEZO
mezuri
MI*
MIL*
militi
minus*
MINUTO
miri
momento
MONO
monato
MONDO
monto
MONTRI
MORGAŭ*
morti
MOVI
MULTA
muro
muziko
-N*
NACIO
NASKI
naturo
NAŭ*
nazo
NE*
NECESA

neĝo
nek*
nenia*
NENIAM*
nenie*
NENIO*
NENIU*
nepra
NI*
nigra
NOKTO
NOMO
nombro
normala
NOVA
novembro
nu!*
nubo
numero
NUN*
NUR*
-O*
-Obl-*
ofico
ofta
OK*
Okazi
oktobro
okulo
OKUPI
OL*
-ON-*
ONI*
onklo
-ont-*
OPINII
ordo
ordinara
ordoni
orelo
organizi
-OS*

-ot-*
ovo
paco
PAGI
paĝo
pano
PAPERO
PARDONI
PAROLI
PARTO
pasi
paŝi
PATRO
peco
peni
pendi
PENSI
PER*
PERDI
perfekta
permesi
PERSONO
PETI
PIEDO
plaĉi
plano
planko
PLEJ*
PLENA
plendi
plezuro
PLI*
plori
PLU*
plumo
pluraj
pluvo
poemo
pomo
popolo
populara
POR*

pordo
PORTI
POST*
postuli
poŝto
POVI
prava
precipa
preferi
prelegi
premi
PRENI
prepari
presi
PRESKAŭ*
PRETA
prezo
PREZENTI
prezidi
PRI*
printempo
PRO*
problemo
produkto
profunda
programo
PROKSIMA
proponi
propra
provi
publiko
punkto
PURA
radio
RAJTO
RAKONTI
RAPIDA
raporti
RE-*
regi
regiono
regulo

reklami
rekomendi
rekta
renkonti
RESPONDI
RESTI
revuo
RICEVI
riĉa
ridi
RIGARDI
rilati
RIMARKI
rimedo
ripeti
ripozi
RIVERO
ROMPI
rondo
rozo
ruĝa
sabato
salono
salti
SALUTI
SAMA
sana
sango
sata
SCII
scienco
SE*
SED*
seĝo
SEKVI
SEMAJNO
SEN*
SENDI
senti
SEP*
septembro
SERĈI

serio
servi
SES*
SI*
SIDI
signifi
silenti
simila
SIMPLA
SINJORO
sistemo
situacio
skatolo
SKRIBI
SOLA
somero
soni
speco
speciala
sperta
sporto
stacio
STARI
stato
STRATO
studi
stulta
SUB*
suferi
SUFIĈA
sukcesi
sukero
suno
super*
supozi
SUPRO
SUR*
ŝafo
ŜAJNI
ŜANĜI
ŝati
ŜI*

ŜIPO
ŝiri
ŝtato
ŝtono
tablo
TAGO
TAMEN*
tasko
teatro
telefono
televidi
temo
TEMPO
TENI
tero
teruro
TIA*
tial*
TIAM*
TIE*
TIEL*
timi
TIO*
TIOM*
tiri
TIU*
TRA*
traduki
TRANĈI
trankvila
TRANS*
TRE*
TRI*
TRINKI
TRO*
trovi
TUJ*
turni
tuŝi
TUTA
-U*
-UJ-*

-UL-*
-um-*
universala
universitato
UNU*
URBO
-US*
UTILA
UZI
vagono
valori
varma
veki
VENI
VENDI
vendredo
vento
VERA
verda
verko
VESPERO
vesto
vetero
VETURI
VI*
viando
VIDI
vilaĝo
vintro
VIRO
vitro
VIVI
vizaĝo
viziti
vojo
VOJAĜI
voki
VOLI
VORTO
ZORGI

Félix Garcia Blázquez
Didaktikaj problemoj en la instruado de korelativoj

En la instruado de Esperanto, specife en perfektigaj kursoj, oni povas rimarki ke konsiderinda nombro de partoprenantoj suferas pro manko rilate al ilia kapableco distingi inter la uzoj de la korelativoj **io** kaj **iu**, precipe en la demonstrativoj. Ekzemploj: „tio tablo" *anstataŭ* „tiu tablo"
„tioj arboj" *anstataŭ* „tiuj arboj".
Ĉi tiuj eraroj estas atribueblaj aŭ al malatento de la lernanto aŭ al malperfektoj en la metodo de instruado. Kiam la instruanto demandas la lernanton pri la motivo, kial li uzas „tio" anstataŭ „tiu", la lernanto argumentas „Al mi oni instruis ke *tiu* estas uzata por personoj kaj *tio* por objektoj."
Efektive, se ni konsultas la bone konatan tabelon pri korelativoj, ni konstatos ke en la plimulto de la lernolibroj oni eksplikas la skemon jene:

serio iu - individuo,
serio io - objekto,

kio iamaniere pravigas la eraron de la lernanto, kaj aliflanke malkaŝas difekton en la didaktiko de la instruado. Vere, ni antaŭsupozas ĉi tie ke ĉia skemo konstituas simpligitan alproksimiĝon al la realo, kaj niaokaze ĝi emas indiki resume la elstarajn karakterizojn de la korelativoj. Oni ne intencas tie ĉi kritiki la nuran fakton ke ekzistas skemo, sed nur atentigi ke tiu konceptado kaŭzas ke la komencanto eraras. La ideo estas perfektigi aŭ kompletigi la skemon por eviti ke la lingvouzanto falu en la montritajn erarojn. Prezentiĝas antaŭ ni la dilemo: aŭ ni plu sekvas la tradician konceptadon de la tabelo kaj lasas ke la lernanto post multaj jaroj de praktikoj kaj eraroj lernu mem ĉiujn ĝiajn funkciojn, aŭ ni liveras detalan klarigon, kiu kompreneble estos pli preciza kaj racia, sed samtempe iomete komplikos la lingvoinstruadon. Ni ekzamenu kelkajn ekzemplojn de la io-serio: *Kio estas tio? - Tio estas kato.*
Lito estas io utila por ripozi.
Via problemo estas ke vi komprenas nenion.
Kio li estas? - Li estas tajloro.
Kion vi diras? - Mi diras ke vi laboras mise.

En la supre montritaj ekzemploj oni povas konstati ke la io-serio povas signifi ne nur objektojn, sed ankaŭ vivantajn estaĵojn kaj eĉ agojn, kiel en la lasta ekzemplo. Aliflanke, oni povas vidi ke neniu io-termino akompanas substantivon. Do, nepre ili ĉiuj estas pronomoj.
Ni ekzamenu la iu-serion: *Tiu lernanto estas la plej inteligenta.*
Tiu kato apartenas al mia fratino.
Tiu arbo estas tre alta.
Kiu lernanto estas la plej inteligenta?
Ĉiu laboristo havas sian propran ilon.
Neniu partoprenanto alvenis malfrue.

En tiuj ekzemploj la terminoj de la iu-serio ĉiam akompanas substantivon. Do, nedisputeble ili ĉiuj estas adjektivoj. Ni vidu ankaŭ aliajn ekzemplojn por la uzo de iu-terminoj: *Tiu ĉi tablo estas el ligno, kaj <u>tiu</u> estas el metalo.*
<u>Neniu</u> alvenis malfrue hodiaŭ.
Kiu estas la plej inteligenta?

En la ĉi-lastaj ekzemploj la substrekitaj iu-vortoj akompanas neniun substantivon. Ili ŝajne estas pronomoj. Sed ni devas memori ke en ĉia lingvo natura aŭ nenatura, ekzistas lica figuro nomata elipsio, pere de kiu oni povas subkompreni terminojn. Ĉu ili estas antaŭe menciitaj aŭ simple troviĝas en la menso de la parolanto? Niaokaze temas pri substantivoj aluditaj per la adjektivoj.
Konkludo: Oni devas forlasi la dogmon: *iu = individuoj, io = objektoj*, kaj substitui ilin per la jeno: ***iu por adjektivoj kaj io por pronomoj***. Preferinde oni ne indiku pri kiaj adjektivoj aŭ pronomoj temas, kaŭze de manko de unuformeco en la nomenklaturo de diversaj naciaj lingvoj.

Konsultitaj verkoj:

Jorge Hess: Sabe Ud. Esperanto? Buenos Aires.
Ergoto de Bonaero: Habla Ud. en Esperanto? Buenos Aires. 1972.
A. Couto Fernandes: Curso de Esperanto. Rio de Janeiro. 1965.

Ing. ***Félix Garcia Blázquez***
Apartado 75.090, Caracas 1070-A, Venezuelo

Carla De Lorenzi
Konsideroj pri Mazi - instrucele

Mi ne kutimas skribi ion post miaj instrukursoj, sed ĉi-foje mi sentas devon mencii kelkajn impresojn kaj eĉ konsilojn rilate la uzon de Mazi instrucele. Ĝi ja estas nova instrumaterialo kaj multaj el ni Mazi-instruantoj povas pensi, ke sufiĉos funkciigi la videokasedon, montri la filmon, lumigi kaj mallumigi la ekranon kaj tio por la lernantoj sufiĉos. Tre erara pensmaniero.
Por la unua fojo en Hispanio (Salou), dum unu semajno, mi havis la okazon gvidi kompletan kurson de *Mazi en Gondolando*. Tio estis por mi tre interesa, entuziasmiga kaj unika sperto, precipe ĉar partoprenis multaj personoj, ne nur komencantoj, sed ankaŭ progresantoj diversaĝaj kaj eĉ instruistoj.
Kompreneble antaŭ ol prezenti la kurson, mi, hejme, longe kaj atente rigardis plurfoje la aventurojn de Mazi por bone koni la tuton, sed ĉefe por trovi la diversajn manierojn, kiuj povus kongrui kun la malsimilaj situacioj, kiujn ĉiufoje mi estus devinta alfronti. Estas tre grave konstati ĉu la lernanto bone komprenas la lingvon en la daŭro de la projekcio. Por atingi tion mi venis al la konkludo, ke je la komenco kaj je la fino de ĉiu parto de la fabelo oni devas klarigi ion.

Por plej efike uzi la filmon kaj veki intereson pri ĝi, oni unue devas prepari la lernantojn praktikante simplan konversacion, kiu poste aperos en la filmo.
Antaŭ ol montri la filmon oni povas, pere de koloraj desegnoj, prezenti la diversajn rolulojn, kiujn la lernantoj renkontos dum la disvolviĝo de la fabelo. Se inter la ĉeestantoj estas veraj komencantoj, estas grave klarigi pere de facilaj ekzemploj la vortojn, kiujn poste ili aŭdos en la filmo. La celo de tiu preparlaboro estas, ke poste rigardante la fabelon ili komprenu preskaŭ ĉion. Sekve oni vidigas la video-filmon. Vere, antaŭe mi ne pensis, ke plenkreskuloj povas esti tiel kaptitaj kaj interesitaj pri ĝi. Ĉiuj atente aŭskultis, rigardis kaj amuziĝis. Post iom da tempo ili komencis ripeti kune kun mi laŭte kelkajn vortojn. Kelkajn scenojn poste la instruisto mem devas decidi, kiam estas la ĝusta momento por haltigi la filmon: tion oni decidas laŭ la nivelo de la lernantoj.
Mi preferas, ke la tekstlibron, apartenantan al la filmo, la lernantoj rigardu poste. Tuj post la rigardo de la filmo estas la ĝusta momento por fari demandojn por konstati, ĉu ili komprenis la rakonton, ĉu ili komencas pensi en la nova lingvo kaj povas uzi ĝin. Estas bone kuraĝigi ankaŭ ilin, peti ilin starigi demandojn unu al la aliaj pri la fabelo. Laŭ mi estas grave enkonduki ankaŭ novajn, praktikajn, aktualajn vortojn, rilatajn al la reala situacio de nia vivo; tio estas, ke ni parolu pri ni mem, nia familio, nia profesio, pri la ĉambro en kiu ni lernas, pri la mebloj, kiujn ni vidas, ktp. precipe pri nia ĉiutaga vivo. Kutime ĝi bone sukcesas.
Mi konstatis montrante Mazi-n, ke la etoso en la ĉambro, malgraŭ la nombro de la personoj (kelkfoje estis 70 ĉeestantoj), estis vigla, ke ili amuziĝis lernante: ĉiuj estis atentemaj, eĉ havis ridetan vizaĝon kaj neniu dormetis. La plej mirinda kaj plezuriga afero por mi estis, kiam dum libera vespero oni petis min gvidi ankoraŭ la kurson post la vespermanĝo, kvankam ili jam havis lecionon ankaŭ posttagmeze! Jen la pruvo, ke Mazi estos tre alloga instrumaterialo.

***Carla De Lorenzi**, Cseh-instruisto*
via Boston 65, IT-10137 Torino, Italio ☎ 011-390.787

KIEL UZI «MAZI» INSTRUCELE - Konkurso de IEI

La intereso pri la nova Cseh-metoda videokurso Mazi en Gondolando ne malkreskas, male ĝi furoras kaj daŭre laborigas nin. Venas multaj reagoj kaj demandoj, al kiuj ni volonte respondas. Oni ja rajtas uzi la Mazi-vidbendojn en lernejoj, kursoj aŭ studrondoj, aŭ montri al ekstera publiko, sed kompreneble oni ne rajtas kopii ilin. Nia celo estas ĝuste, ke la aĉetintoj de la Mazi-kurso utiligu ĝin ne nur por sia propra familia uzo, sed trovu aplikojn de Mazi ĉie ajn en la instruado de E-o. Tial ni anoncas konkurson: *Kiel uzi «Mazi» instrucele?*

Pensu pri la plej entuziasmiga kaj efika maniero por lernigi E-on per kaj kun *«Mazi»* kadre de via propra instruado, kaj instigu aliajn fari same!
Via(j)n propono(j)n sendu al la Internacia Esperanto Instituto (IEI) en Hago ĝis la fino de decembro 1996. La plej interesaj ideoj ricevos premion de IEI kaj estos publikigitaj en Internacia Pedagogia Revuo kaj Eventoj. Laŭeble la premiitaj proponoj estos poste publikigitaj en aparta kajero.
Eblas mendi Mazi-kompletojn ĉe IEI, la prezo estas 198 NLG (kune kun la sendokostoj). Se vi pagas per banko, ne forgesu aldoni la bankkostojn (21 NLG).

Adreso: ***Internacia Esperanto-Instituto**, Riouwstr.172, 2585 HW Den Haag, Nederlando, Tel.+fakso: ++31.70.3556677. Poŝtkonto 162626*

GEORGO MACIOSZEK

Por la suferanta komencanto

- Kelkaj simpligoj de la lingvo

Antaŭparolo de la Redakcio: *Ni, praktikantaj esperantistoj kaj precipe instruistoj de la internacia lingvo, ofte renkontas komencantojn kiuj - nesciante bone uzi la lingvon - iniciatas reformojn, plibonigojn rilate ĝin por tiel pravigi la proprajn erarojn. Tiuokaze ni respondas, ke ili unue regu ĝin bone kaj poste cerbumu pri plibonigoj. Poste tiuj reformuloj aŭ tute forlasas la movadon aŭ ellerninte la lingvon pretas obei ties regulojn kaj ne plu pensas pri la iamaj ideoj. La sekva artikolo de relativa komencanto tamen estas pensiga kaj instrua al ĉiu aktiva instruisto. La lingveroj kaj gramatikaĵoj, kiuj laŭ la verkinto estas modifendaj, klare montras al ni la punktojn al kiuj ni turnu pli da atento, ĉe kiuj eroj estas bezonata pli da ekzercado. La artikolo estas publikigita ne pro tio, ĉar la redakcio konsentas pri la proponoj de s-ro Macioszek, sed pro la fakto, ke neglektante tiujn problemojn ni ne solvas ilin, ne pretiĝinte respondi al ili ni ne povas kontraŭargumenti.*

Kiam mi esperantistiĝis antaŭ tri jaroj mi estis impresita de du lingvo-elementoj, kiuj estis promesitaj al mi: neŭtraleco kaj simpleco. La neŭtralecon mi povas konfirmi, pri la simpleco mi havas dubojn.
Kiel komencanto je la sojlo al progresinta komencanto mi havas la impreson ke la movado pli profitus se multaj komencantoj daŭrigus la lernadon ol se malmultaj progresintoj finfine regus la lingvon.
Sed la komencantoj havas malgrandan politikan potencon en Esperantujo. Ĉar ili pro manko de lingvokapablo malofte partoprenas diskutrondojn kaj publikigas malmultajn artikolojn, iliaj interesoj estas reprezentataj nur malofte. Se iu el ili tamen aŭdacas balbutante proponi plisimpligojn de la lingvo, la funkciuloj tuj atakas lin kiel nekompetentan kaj megalomanian novulon.

La funkciuloj plejparte flue kaj bone regantaj la lingvon nature malmulte interesiĝas pri lingvoŝanĝo. Por ili ŝanĝo estus streĉo, ili devus parte relerni la lingvon, kio ĉiam estas pli malfacila ol lerni je la komenco.
Bernard Golden, eminentulo de la movado, kies proponon *Mi bolas la akvon - la akvo bolas* mi tutkore kaj ĝoje subtenas, per sia artikolo kuraĝigis min proponi kelkajn plisimpligojn de la lingvo. Se grandulo kiel li pensas pri la baraktantaj komencantoj, eble estas pliaj movadanoj perfekte regantaj la lingvon, kiuj same simpatias kun la komencantoj.
Tampereo, mia unua kongreso, montris al mi, ke la lingvo estas preciza kaj esprimriĉa kaj povas esti uzata kiel iu ajn nacia lingvo. La pruvon de tio ĉi mi spertis kiam en unu el la kunsidoj du kverelemuloj agreseme kaj malbonfareme atakis funkciulon. Mi estis ŝirita inter kompato por la viktimo kaj admiro de la flua kaj bela lingvo de la farantoj. Do Esperanto vere vivas kaj viglas.
Mi nepre deziras konservi la esprimriĉecon de la lingvo kia ĝi estas nun. Miaj proponoj rilatas nur al elementoj kiuj plimalfaciligas la lingvon sen aldoni ion ajn al ĝia esprimriĉeco.
1) **Uzu „estas bona"** anstataŭ „estas bone": La distingo inter „Tio estas bona" kaj „estas bone" estas nur por gramatik-ŝatantoj. „Estas bona" nek malplialtigas la precizecon nek la riĉecon de la lingvo.
2) **Uzu la „u" finaĵon** nur por la imperativo: Do: „mi volas ke li venos" kaj „mi laboras por ke mi gajnos monon". Denove estas nur por gramatik-ŝatantoj. La regulo estas superflua kaj senfunkcia.
3) **„Da":** Uzu „de" aŭ entute rezignu pri la partitivo: „miloj homoj", „amaso de bestoj". Sen „da" la lingvo estas same komprenebla; do ni forigu ĝin.
4) **„Sia - lia":** La distingo inter „sia" kaj „lia" sendube havas funkcion. Ĝi faras la cirkonstancojn pli precizaj. Sed la nuna regulo estas konfuza, ĉar la precizeco ne estas permesita ĉe la subjekto. Ni rajtas diri „*La patro vizitas sian fraton*", sed ne „*La patro kaj sia frato*". Permesi „sia" ĉe la subjekto estas unu solvo, alia estas forigi „sia" entute. Mi favoras forigi „sia". Tiam la lingvo estus same nepreciza kiel la angla kaj germana, kiuj havas nur unu vorton (*sein, his*). Ĉu vere estas katastrofe, se E-o ne superas naciajn lingvojn ĉi-rilate? Do: *li vizitas lian fraton*. La vivo de la komencanto estus konsiderinde pli facila.
5) **„edziniĝi":** Mi proponas enkonduki inajn verbformojn por ĉiuj verboj. Tiam virinoj *lerninas, skribinas* kaj *parolinas*. Alia solvo estas forigi „edziniĝi" kaj uzi nur „edziĝi". (Oni uzas *eksedziĝi* rilate ankaŭ virinojn, do ne *eksedziniĝi*.) La senco de la frazo estas same klara kaj la komencanto havas unu malfacilaĵon malpli.
6) **Landnomoj:** Ni formu simplan adjetivon kaj aldonu „lando". Do: *Finnalando, Rusalando, Korealando, Usonalando, Svisalando, Egiptalando, Aŭstralalando, Britalando*. Ĉi-maniere la komencanto ne plu devus lerni diversajn finaĵojn.

7) **La akuzativo:** E-instruistoj kiuj konas lernantojn el ĉiuj nacioj konsentas ke la akuzativo estas unu el la plej oftaj eraroj. Eĉ tiuj parolantoj, kiuj havas ĝin - kiel la germanoj - baraktas kun ĝi. Ni trankvile kalkulu la avantaĝojn de la libera vortordo kontraŭ la daŭra demotivigo de la komencantoj. Ŝajnas al mi ke la valoro de la libera vortordo estas ege supertaksita. Spite al sia terura barilo de mallibera vortordo la angla kreis grandajn verkojn de la mondliteraturo. Evidente la anglaj verkistoj ne scias kiel handikapitaj ili estas. Krome, mia impreso en Tampereo estis ke sendepende de sia nacieco la homoj en la parolata lingvo tre malofte metas la objekton je la komenco de la frazo. La vasta plimulto uzas la vortordon subjekto-predikato-objekto. Tamen veras ke en la E-literaturo - origina aŭ tradukita - la libera vortordo estas uzata pli ofte. Por plifaciligi la vivon de la komencantoj sen ignori la akuzativ-ŝatantojn mi sugestas la jenan kompromison: ni uzu la akuzativon nur ĉe la libera vortordo, t.e. kiam eblas miskompreno. Ĉe la vortordo subjekto-predikato-objekto la akuzativo estas superflua; la aŭskultantoj aŭ legantoj ĉiam komprenas la sencon. Do: *Mi vizitas la frato. Mi vizitas li. La fraton mi vizitas. Lin mi vizitas.*
8) **Transitiveco:** En la angla multaj verboj estas transitivaj kaj samtempe netransitivaj: *„the show starts, we start the show".*
Ni devas diri: *„la prezentado komenciĝas, ni komencas la prezentadon".*
Mi proponas sekvi la rekomendon de Bernard Golden kaj uzi la saman formon transitive kaj netransitive: *la fero fandas* – mi fandas la fero, *la leciono finas* – mi finas la leciono, *la fenestro fermas* – mi fermas la fenestro, *la rado turnas* – mi turnas la rado, ŝi naskis la bebo – *li naskis en Londono*, la lernanto ĉagrenas la instruisto – *la instruisto ĉagrenas*.
La distingo inter la du formoj utilas kiel la tri genroj de germanaj substantivoj. Plisimpligo sen redukto de esprimriĉeco ankaŭ tie ĉi eblas.
Eĉ se miaj proponoj estos bonvenaj, E-o ne estos facila lingvo. Ĝi estus nur libera de kelkaj senvaloraj malfacilaĵoj. La komencantoj tiam povus koncentriĝi je la malfacilaĵoj, kiuj estas la prezo de esprimriĉeco.

Tiel aspektas kaj sonas la apliko de miaj proponoj: ***„Estas konata ke lerta komercisto ne riproĉas liaj klientoj kiam lia komerco ŝanĝas al la pli malbono. Male, li serĉas la kulpo ĉe li mem kaj provas plibonigi lia varo por ke la klientoj ne iras al alia kompanio. Similan procedon povus elprovi la esperanto-movado. Ĝia varo estas la lingvo, ĝiaj klientoj estas la homoj de la ekstera mondo, precipe la komencantoj. Por ke ili ne elektas alia agado kiel libertempa plezuro, la movado ofertu al ili pli alloga varo. Kiam la nova prezidento de UEA vojaĝos tra la mondo, de Svedalando al Aŭstralalando, de Japanalando al Usonalando, per ĉi-tiu pli bona varo li gajnos pli klientoj. Li atingos ke la movado movos antaŭen pli rapide.***
La ŝanĝoj plifaciligus la vivon de lernantoj kaj instruistoj.
Ĉu ne estus bona celo?

***D-ro Georgo Macioszek**, Hamburgo*

El niaj metiejoj

NdlR – Nia redakcio ricevis du plastajn dosierujojn kun manuskriptoj de 70 ekzercoj kompilitaj de ***Odette Scheidel*** *(Betschdorf, Francio). Jene mi citas el ŝia letero:* „La ludoj, kiuj estas al vi proponataj estas nur aro da ideoj, kiujn mi kore donacas al vi... La infanoj en Francio lernas 3 ĝis 4 lingvojn en la lernejo, sincere, oni ne povas trudi al ili listojn da vortoj, gramatikaĵojn ktp. Ili laboras la tutan tagon, do, mi venis al la konkludo: E-o devas iĝi plezuro, distro, amuzo. *La senditaj ekzercoj konsistas el slipetoj, desegnaĵoj, eltonditaj bildoj, fotoj. Ĝuste pro tio nia revuo povas aperigi nur kelkajn tipojn de la ekzercoj.*



La unua, simpla ekzerco, kiun ni nun el la ekzercaro prenos nomiĝas ***Kukola ovo****:* **Divenu kiu vorto ne apartenas al la grupo?**

	A	B	C	D	E
1.	*lupeo*	*mikroskopo*	*episkopo*	*binoklo*	*lenso*
2.	*ĵudo*	*bokso*	*amboso*	*teniso*	*skermo*
3.	*orgio*	*hobojo*	*klarneto*	*mandolino*	*tubjo*
4.	*rombo*	*ovalo*	*cilindro*	*cirkelo*	*triangulo*
5.	*asterisko*	*komato*	*punkto*	*krisigno*	*apostrofo*
6.	*karpo*	*salmo*	*turdo*	*tinuso*	*haringo*
7.	*cilindro*	*tiroido*	*kubo*	*piramido*	*konuso*
8.	*abio*	*acero*	*ardezo*	*kverko*	*akacio*
9.	*monedo*	*emuo*	*papago*	*mopso*	*pingveno*
10.	*opalo*	*smeraldo*	*safiro*	*rubuso*	*ametisto*
11.	*lieno*	*tibio*	*tonsilo*	*miogalo*	*hepato*
12.	*gerilo*	*makako*	*ĉimpanzo*	*gibono*	*mandrilo*
13.	*diri*	*deklami*	*rakonti*	*strabi*	*babili*
14.	*kuiristo*	*maristo*	*aoristo*	*kukisto*	*vendisto*
15.	*dianto*	*peonio*	*soleo*	*siringo*	*irido*
16.	*kuiri*	*baki*	*agnoski*	*brogi*	*spici*
17.	*turbo*	*globo*	*domeno*	*trogo*	*ŝako*
18.	*ŝipo*	*boato*	*pramo*	*kulo*	*floso*
19.	*Tokio*	*Barcelono*	*Kairo*	*Ateno*	*Varsovio*
20.	*pizo*	*kukurbo*	*kukumo*	*melongeno*	*fibolo*
21.	*kariofilo*	*dieso*	*cinamo*	*muskato*	*pipro*
22.	*pasero*	*fringo*	*gruzo*	*kukolo*	*merlo*
23.	*daktilo*	*liĉio*	*frambo*	*cikado*	*cidonio*
24.	*avelo*	*juglando*	*pepo*	*ternukso*	*kokoso*

Solvoj: 1C, 2C, 3A, 4D, 5B, 6C, 7B, 8C, 9D, 10D, 11D, 12A, 13D, 14C, 15C, 16C, 17D, 18D, 19E, 20E, 21B, 22C, 23D, 24C

El la landoj kaj sekcioj...

Albanio

La Albana ILEI-Sekcio fondiĝis en 1993. Tuj post tio ĝi lanĉis vastan kampanjon por la E-instruado en la lernejoj. Malfermiĝis kursoj en Tirana Universitato, en fremdlingva mezlernejo, en gimnazioj „Sami Frasheri" kaj „Qemal Stafa", bazlernejoj „Jeronim Derada", „Konferenca e Pezes" kaj en „Kombinat". Kursoj startis ankaŭ en Durres, Kukes, Peshkopi kaj Lezhe. Jen la listo de la instruintoj: Vasil Pistoli, Bardhyl Mezini (*sekciestro*), Zamir Gjurgji, Sajmir Beqiraj, Ornela Demiri, Suela Kora, Maeda kaj Migena Ikonomi, Alda Tola, Majlinda Bime (en Tirane), Denis Hasa, Luan Jaupi, Majlinda Grashi (*sekretario de la Sekcio*; en Durres), Mimoza Bunjaku, Nehat Sokoli, Shaban Hasani (en Kukes), Agim Peraj (en Lezhe), Artur Doci (en Peshkopi) kaj Gjergji Gusho (en Pogradec). Pli ol 200 kursanoj ricevis atestilon. Ekde decembro 1994 funkcias ankaŭ koresponda kurso gvidata de f-ino Rita Permeti (*kasisto de la Sekcio*). Oni verkis ĝis nun du lernolibrojn: Vasil Pistoli en 1991 kaj Zef Mjeda en 1993.

La Sekcio rajtis partopreni la Konferencon en Barcelona en 1993. Ĝi sukcesis partoprenigi tri membrojn en la seminario de *La Chaux de Fonds* en Svisio. Maje de 1994 12 gimnazianoj ekzameniĝis en Zagrebo. La Sekcio en 1995 havis 16 membrojn.

La Albana Ministerio de Edukado pretas enkonduki la internacian lingvon en kelkdekojn da lernejoj, kondiĉe, ke oni havos sufiĉe bone trejnitajn E-instruistojn. Estus bonvene, se alilandaj universitatoj pretus akcepti albanojn je favoraj financaj kondiĉoj. Krom tio la Sekcio bonvenigus didaktikajn materialojn por la E-instruado.

Laŭ la informoj de ***Bardhyl Mezini***
kaj *Bulteno de la Albana ILEI-Sekcio...1/95*

Aŭstralio

1. Asocio por Aŭstraliaj E-instruistoj – laŭ *La Lumilo 1/96*

„Naŭ homoj, kiuj tre interesiĝas pri la starigo de asocio por E-instruistoj en Aŭstralio, kunsidis dum la Adelajda Somerlernejo. Ĉar Jennifer Bishop havas nomojn de multaj, kiuj jam instruas aŭ esperas instrui E-on, la grupo donis al ŝi la taskon prepari provnumeron de priinstruada novaĵletero, kiun Donald Broadribb eble pretos enmeti en la koverton de la venonta numero de *Esperanto sub la Ŝuda Kruco*, kaj kiun ni aliaj povas sendi ankaŭ al homoj, kiuj ankoraŭ ne estas membroj de A.E.A.

Kredante, ke vere gravas la profesia preparado de profesiaj E-instruistoj en nia lando forte ligitaj kun la tutmonda E-kulturo kaj la tutmonda E-instruistaro,

kelkaj ĉeestantoj eĉ tuj donis kelkajn dolarojn por komencigi la laboron. Oni emfazis, ke tiuj, kiuj volas profesie instrui E-on kaj prepari estontajn E-instruistojn, devas flue paroli nian lingvon kaj havi bonan diplomon pri E-o kaj lingvo-instruado."

Max Wearing

2. 12-a Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro

Ĝi okazis inter la 12-a kaj 27-a de januaro en Adelajdo, en la kongresurbo de la jaro 1997. La januara somerarangxo estis sukcesa, ĉeestis pli ol 60 esperantistoj. Instruis s-*ino Jennifer Bishop, s-ro Marcelo Leereveld* kaj *s-ino Katalin Smidéliusz*. Lingvokursoj disvolviĝis je kvar niveloj. Krom ili abundis fakultativaj programoj: preparo por supergrada lingvoekzameno, prelegoj pri la projekto „Ekparoli", pri E-periodaĵoj kaj korea geedziĝfesto; kunsido de la kongreso-organizantoj, videofilmoj kaj *Mazi*-prezentadoj, dancado, korusa kantado, kurso pri komputiloj kaj Internet, ekskursoj buse, aviadile, bicikle kaj perpiede; arboplantado en la urba parko - rigardu ĝin dum via kongresumado - anglamaniera libera forumo, la „*Sapskatolo*"; amuzaj vesperoj kun ludoj kaj teatraĵoj. Por esti ĉiam informita kaj helpata funkciis akceptejo kun afabla deĵorantino, libroservo, aperis ĉiutage *La Lumilo*, propra periodaĵo.

Kvankam por mi estis laboro, mi fartis tre bone en la modele organizita arangxo. Mi ĝuis la kuneston kun amikemaj, studemaj samideanoj, aparte ĝojigis min la viglaj kaj spritaj junuloj, la familieca etoso. La tuto estis multe pli interesa ol kutima lingvokursaro; ni vivis dum du semajnoj „esperante".

Ankaŭ jene mi dankas elkore la eblon, ke mi povis viziti (kaj turmenti) vin kaj gratulas al la preskaŭ 20-membra organiza skipo kun *Max Wearing* ĉekape pro la senlaciĝema laboro. Mi longe memoros vian interesan mondon kaj januaran varmegon.

***Katalin Smidéliusz**, Hungario*

Brazilo

1. III-a Interlanda Konferenco pri Instruado (Argentino - Brazilo)

12-15 okt. 1995 Campos do Jordão, SP, organizita de E-Asocio de San-Paŭlo.

Temo: *„Uzo de modernaj rimedoj por instruado de Esperanto"*.

Ĉeeste de 150 personoj (182 aliĝintoj) okazis unu el la plej sukcesaj renkontiĝoj lastatempaj pro riĉeco de enhavo kaj ĝenerala interesiĝo. Entute estis 12 prelegoj, krom 4 ŝtataj kunsidoj, BEJO-kunveno, debatoj, forumoj, konversaciaj rondoj, video-prezentoj, lanĉoj de ses novaj libroj, aŭkcio favore al *Fondaĵo Ameriko*, ampleksa libroservo kaj variaj artaj prezentadoj. Reprezentantoj el 32 brazilaj urboj kaj 2 el eksterlando (Argentino kaj Svedio) salutis la eventon.... La IV-a IKI okazos en Buenos Aires, Argentino, en la jaro 1997.

(El *La Lampiro* 10-12/95)

2. Vizito al Brazilo

Revenoj al Brazilo signifas ĉiam en mia E-instruista vivo restadon meze de nekredeble entuziasmaj gelernantoj, kursojn multnombrajn kaj ĝuadon de etoso

ĉarma. Komence de novembro 1995 mi alteriĝis en São Paulo. Post vizitoj al Afriko januare kaj al Eŭropo meze de la jaro mi esperis ĝui por la tria fojo en la sama jaro la varmegon de somero, sed ... vane. Malgraŭ la malvarmo reginta la regionon, amika bonvenigo ĉe la flughaveno komencigis brilan restadon en la giganta Brazilo.

La Kultura Centro Esperantista de urbo Ribeirão Preto mecenatis mian viziton kaj la ĉefa intenco estis pretigi la grundon cele al la 32-a Brazila E-Kongreso okazonta julie 1996 tie mem. La Kultura Centro estas integra parto de la Homeopatia Instituto François Lamasson, kiu de 1993 adoptis E-on kiel laborlingvon, eldonas la dulingvan revuon *Homeopatia esplorado* kaj daŭre subtenas E-kurson por ĉiuj gelernantoj de la Instituto. Agrabla surprizo estis ekscii, ke ĉi-jare estis eldonita la verko *Mallonga E-kurso por homeopatiaj fakuloj*, bazo por la lernado de la Internacia Lingvo tie.

En Ribeirão Preto mi gvidis tri kursojn diversnivelajn, unu el kiuj estis aparte dediĉita al ĉiuj funkciuloj de la Instituto. Dum tiuj kursoj mi utiligis la filmon *Mazi en Gondolando*, kiu daŭre konkeradas korojn ankaŭ en la suda hemisfero.

La loka ĵurnalo apogis la diskonigon de la kurso per aperigo de diversaj informoj pri ĝi. Ankaŭ FM Radio Tropical malavare dediĉis 30 minutojn al intervjuo, kiam mi informis pri E-o kaj kursoj kaj s-ino Neusa Priscotin Mendes pri la agado por E-o en la urbo.

Mia instrua tasko ne finiĝis tie, ĉar revene al São Paulo mi vizitis la kurson de s-ino Aparecida Dorta Soares en la Instituto de Educaçao Espírita, kaj tiam 12-ope ni per ludoj kaj kantoj plulernadis. Aldone estis organizita baza kurso en la sidejo de la E-Asocio de São Paulo kun 14 gelernantoj, kiuj dum tri tagoj kaj de frumateno lernadis entuziasme kaj ĝoje.

Mia trisemajna vizito al Brazilo pleniĝis ankaŭ per diversaj vizitoj, ĉefe al la nova Prezidanto de Brazila E-Ligo, s-ino Symilde Schenk-Ledon, kiu afable gastigis min ĉe sia bieno Maĉu-Pikĉu en urbo Campos de Jordão. Tiu bieno funkcias ankaŭ kiel renkontiĝejo por la esperantistoj kaj lastatempe tie efektiviĝis la 3-a Interlanda Konferenco pri Instruado.

Brazilo estas lando kun nekredebla impeto, kun forta entuziasmo kaj konkreta laboro por nia Movado. Certe ĝi meritas multajn laŭdojn, des pli vizitojn de eksterlandanoj... iru, do, kaj spertu mem! La 32-a Brazila Kongreso atendos vin en Ribeirão Preto.

Atilio Orellana Rojas, Argentino

Ĉehio

Somera Esperanto-Tendaro en Lanĉov

Ĝi okazos en tri etapoj (30.6.-13.7.1996, 14.7.-27.7.1996 kaj 28.7.-10.8.1996.) en la tradicia loko ĉe la digolago de Vranov, apud la vilaĝo Lanĉov, distrikto Znojmo, en suda Moravio. (La plej proksima fervoja stacio estas Ŝumna (trako 241). De Ŝumna vi povas pluvojaĝi per buso al Vranov.)

La instruado de E-o okazos ĉiutage de la 8-a ĝis la 12-a horo en tri diversgradaj kursoj. En la tendaro okazas ankaŭ kursoj de la angla, franca kaj germana. La loĝado estas en kvarlitaj kaj kvinlitaj kabanoj. Posttagmeze okazas sinbanado, sportado, ekskursoj, vespere tendarfajroj kun kantado kaj aliaj programeroj.
La kotizo de 200 DEM (por ekssocialismaj landoj 150 DEM) inkluzivas kvar manĝojn tage, loĝadon kaj instruadon. La ekskursoj – unu tuttaga al Vieno kaj du duontagaj – ne estas enkalkulitaj en la kotizo. Ili kostas proksimume 12 DEM. Gvidanto, kiu akompanas 10-personan grupon, ĝuos 50%-an kaj gvidanto de kvinpersona grupo 25%-an rabaton.

Aliĝadreso: *Esperanto-Klubo, CZ-674 01 Trebiĉ, Ĉeĥa Respubliko*

Ĉinio

Kontribue al plivastigo de E-o - *entreprenistino lekciis en Pekina Universitato*
La 24-an de decembro 1995 juna entreprenistino Chai Ping ascendis podion de Pekina Universitato kaj resume lekciis pri Esperanta gramatiko en E-kurso de la Universitato. La kurso komenciĝis en la 12-a de novembro 1995, en ĝi studas 45 studentoj, esplor-studentoj kaj instruistoj el diversaj fakultatoj de la universitato. Ili lernas diversajn fakojn, sed ili deziras ellerni la internacian lingvon por tuj apliki ĝin en la internaciaj akademiaj rilatoj.
S-ino Chai Ping estas konstanta ĝenerala vicdirektoro de Pekina Guaxun-a Konsultiĝa Kompanio. Malgraŭ tiu granda okupiteco ŝi prenis tempon por lerni E-on kaj akiris evidentan sukceson. Ŝi decidis fari sian kontribuon en la disvastigo kaj apliko de E-o en sciencaj, edukaj, ekonomiaj kaj komercaj kampoj.

Shen Chengru

Estonio

La 9-an de decembro *[1995]* okazis en Tallinn en la Nacia Biblioteko la dua seminario por estonaj E-instruistoj fare de la E-Instituto de Estonio (EIE) kaj la Pedagogia Fako de la E-Asocio de Estonio. Partoprenis ĉambropleno da homoj. La seminario estis dediĉita al la uzado de vidbendoj en E-instruado. La instruado de E-o devas atingi pli altan nivelon. EIE havas vidbendojn *Mazi en Gondolando*. Estas 12 Ĉe-metodaj lecionoj. Ĉi-foje oni vidis 6 lecionojn. Sekvaj seminarioj estos en la komenco de la nova jaro kaj en printempo. Per la uzado de la vidbendo estas eble instrui tre rapide kaj facile. EIE havas ankaŭ kelkajn aliajn filmojn pri aliaj temoj....
EIE sukcese instruas E-on al kelkaj grupoj. Ĝi intencas aranĝi E-instruadon ankaŭ en kelkaj institucioj, kun kelkaj el ili jam estas kontraktoj. En la lernoplano de unu ankaŭ E-o oficiale enestas kaj oni volas tie instrui E-on al 120 personoj. EIE havas intencon fondi fakon de la Akademio San-Marino. Estas kelkaj projektoj - necesas labori, labori.
(Laŭ *Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio* N-ro 4/95)

Finnlando

1. Kongreso de nordiaj instruistoj
La asocio de finnlandaj lingvoinstruistoj SUKOL organizas kongreson NORDLINGUA en la urbo Espoo apud Helsinki inter la 24-a kaj 28-a de junio 1996. La kongresaj lingvoj estas la sveda kaj angla, sed partoprenos instruistoj de multaj lingvoj (germana, franca, hispana, rusa, portugala, itala...) kaj la kongreso celas ĉiajn lingvoinstruistojn.
SUKOL invitis ankaŭ la Esperanto-Ligon de Finnlandaj Instruistoj starigi pri-Esperantan ekspozicion kaj prelegi pri Esperanto angle. Dankon al ILEI-anoj kaj aliaj, kiuj jam helpis kaj daŭre helpas al la realigo de la planoj.

Aliĝadreso de la kongreso: *Rautatieläisenkatu 6 A, 00520 Helsinki, Finnlando, tel. (9) 0-150 21, fakso (9) - 144095.* (SUKOL-anoj ne komprenas Esperanton.)

***Raita Pyhälä**, prezidanto de ELFI, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi*

2. Skolta tendarego Loisto '96 en Hango, Finnlando, 18-26 julio, 1996
Ĝin partoprenos pli ol 10 000 skoltoj el la tuta mondo. Skolta E-Ligo (SEL) planas organizi kunan loĝadon de E-skoltoj en propra tendargrupo kaj aranĝos SEL-kunsidon, SEL-standon, elekteblan agadpunkton pri E-o kaj pli ampleksan E-kurson por malgranda grupo de partoprenantoj. Bonvena estas subteno de la tuta E-movado por ilia agado. Pliajn informojn donas la nacia reprezentanto de SEL en Finnlando: *Carola Antskog, Mattkarr, FI-25700 Kimito*

A. M. Ritamaki

Francio

1. E-aranĝoj en Francio
- ***E-restado kun diversnivelaj E-kursoj*** okazos en feriejo „Batipaume" ĉe Mediteranea marbordo de la 12-a ĝis la 16-a de junio 1996. Informas: *Cercle Biterrois d' Espéranto, 9, Rue Georges Picot, 34500 Beziers, Francio*
- ***Internacia E-semajno*** kun 3-nivelaj kursoj okazos en feriejo „Le Lazaret" en Séte (Hérault) de lundo, la 9-a ĝis lundo, la 16-a de septembro 1996. Jen bonega okazo sin bani en Mediteranea Maro, en internacia etoso, por (ek)lerni la Internacian Lingvon, por ripozi aŭ viziti tre agrablan regionon. Informas: *Centre Culturel Esperanto de Montpellier 5, Rue du Docteur Roux 34000 Montpellier, Francio*

Louis Ensuque

2. Expolangues aŭ 14-a lingvofoiro en Parizo
Jam tradicias tiu ĉefaranĝo por lingvoamantoj. Kvankam proporcie daŭre multnombras la asocioj, firmaoj, eldonejoj, kiuj proponas instruadon de la angla, tamen Expolangues estas okazo konatiĝi kun aliaj landoj, lingvoj kaj kulturoj. Ĉi-jare la ĉefa gasto estis Turkio, kiu regalis nin ne nur per koncertoj kaj restoracio sed ankaŭ per fasko da interesaj prelegoj pri la turklingva literaturo

- Internet kaj Esperanto (László Szilvási - lia prelego aperis en *Eventoj*),
- Eŭropa poezio en Esperanto (D-ro Miklós Fehér),
- Ĉu veras „sana korpo = sana menso"? (Gyöngyi Mézes),
- Dramludoj en la lingvo-instruado (István Lannert),
- Pupteatra ludo kun infanoj (Erzsébet Regőczi),
- Lerni aŭtodidakte E-on (János Sárközi).

Dum la Pedagogiaj Tagoj la Hungara ILEI-Sekcio havis sian asembleon, kun pluraj gravaj decidoj. ***Jozefo Németh***

2. Teatro en Esperanto cent jarojn poste - Eger (Hungario) 05-09 julio 1996
Kooperativo de Literatura Foiro ĉiujare organizas Internacian Literaturan Forumon, ĉiujare en diversaj landoj, pri diversaj temoj. La ĉi-jara, la 15-a estos dediĉita al la E-teatro, ĉar antaŭ 100 jaroj okazis la unua prezento surscena en nia lingvo. Kelkaj eroj el la programo: Trafo kaj maltrafo en la E-teatro (*Georges Lagrange*), La unuaj jaroj de nia teatro: 1896-1914 (*Zofia Banet Fornalowa),* Pri la Esperanta pupteatro (*Ljubomir Trifonĉovski*), La spegulo de Velodaĵo (*de Giorgio Silfer*), Perfektiĝo en E-o per teatraj formoj (*Belka Baleva*), Kien la E-teatro (*rondtablo kun István Nemere*), La signifo de la teatro en minora lingvo. Prezentiĝos ankaŭ *Anjo Amika, Andres Bickel, Vida Jerman, Jerzy Fornal* kaj la Bulgara E-Teatro. Organizas kaj informas:
Kooperativo de Literatura Foiro CP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, kaj Esperanto PEN-Centro, PF 117, H-1581 Budapest.

Irano

Ekde 26.7.74 (18.10.95) estas aranĝitaj E-kursoj en Ĥaváran kulturejo por gestudentoj. La kursojn gvidas M. Reza Torabi. Oni faris fakan komisionon pri la internacia lingvo en la kulturejo por esplori pri E-o.
Pli ol 150 personoj partoprenis en la enkonduka kurso. Oni planas ankaŭ progresan kaj konversacian kursojn. (Laŭ *IREJO-Bulteno* - novembro-decembro '95)

Japanio

„Mi multe pensis kiel allogi komencantojn de E-o por ke ili trovu interesajn aferojn en nia lingvo kaj amuze lernu E-on. Finfine mi havis la ideon fari konkurson inter komencantoj pri la vortoj, kiujn ili lernis.
Por fari tiun konkurson interesa, mi pensis ke ni donu al la gajnintoj iun premion. Por tio mi serĉis subtenantojn. Multaj esperantistoj kaj ne-esperantistoj donacis monon kaj mi komencis la laboron.
Laŭ mia plano la lernantoj partoprenas la konkurson en du niveloj: elementa kaj postelementa. Tiu konkurso similas al ekzameno, kadre de kiu oni ricevas liston de 100 vortoj elektitaj el iu lernolibro. La unuaj 50 vortoj estas en E-o, la ceteraj en la japana. Se iu sukcesos traduki ĉiujn 100 vortojn, kiel ĉampiono ricevas ¥ 30.000. Kaj se neniu sukcesus fari tion, la unuaj tri plej bonaj tamen

ricevas premiojn. En la 43-a kansaja kongreso en 1995 en urbo Uzi por la unua fojo mi okazigis tiun konkurson. Ĝin partoprenis 10 homoj. Neniu gajnis tiun sumon, tamen la unuaj tri ricevis vortaron kiel premion.
Por la preparo de la vortoj helpis min s-ro Okumura Rinzo. La nomo de tiu konkurso estas Estan-olimpiko. "Estan" estas miksaĵo de Esperanto kaj japana vorto kaj signifas Esperantajn vortojn. Mi nun preparas la venontan konkurson kaj por tio mi bezonas helpon de japanaj esperantistoj por ilia konsilo, interalie por elekto de lernolibroj kaj preparo de la vortolisto."
***NISHIMURA Yoshihiro**, 1-1-317 Nanryo-cho, Uji, Kyoto, 611 Japanio, fakso: 81-(0)774-24-6428 tel. 81-(0)774-22-8331*

Litovio



En Panevežisa mezlernejo "Vyturys" (Alaŭdo), kies direktorino estas Vitalija Bziuriĉiené, Esperanto estas elektita kiel studobjekto kaj jam devige instruata (unuafoje en Litovio). En kvar paralelaj sesaj klasoj, duone dividitaj, la internacian lingvon komencis lerni entute 80 gelernantoj. La instruistoj estas Alina Misiŭnienė kaj Vladislovas Viršila. Do ni ĉiuj elkore dankas la direktorinon de la lernejo kaj deziras plenan sukceson al la geinstruistoj. Ni esperu, ke ĉi tiun bonan ekzemplon de la lernejo "Vyturys" sekvos ankaŭ aliaj lernejoj de Litovio. Por kuraĝigi kaj pli interesigi la gelernantojn, skribu, sendu poŝtkartojn, proponu korespondadon.
La adreso estas: *Esperanto Panevézio "Vyturio" viduriné mokykla, Vasario 16-osios 40, LT-5300 PANEVEZYS, Litovio* ***Telesforas Lukoševičius***
(El Litova Stelo 5/95)


Nederlando

1. Sabate, **la 8-an de junio 1996**, okazos **internacia kunesto de infanoj** okaze de la ceremonia festo de daŭriga porinfana E-jarkurso en la kvartaldomo de „De Schullhoek", Heemskerk.
Ni invitas nederlandajn kaj eksterlandajn infanojn partopreni la ĝojigan kaj interesan tagon, kiam ili rajtos prezenti sian poemon, kanton aŭ teatraĵeton; kiam ili rajtos konkursi por premioj kun samaĝuloj; kiam ili rajtos komune lerni novajn kantojn kaj ĝui senpagan lunĉon; kiam ili, antaŭ ĉio, povos enamikiĝi per la internacia lingvo Esperanto.
De la 11-a horo ĝis la 16^{30} bonvenas ne nur infanoj, sed ankaŭ akompana karavano kaj Esperantama amikaro. Por eksterlandanoj ni pretas, post detalaj peto kaj informo, aranĝi tutsemajnan gastadon pere de nia gastservo. Ĉiu bonvolu antaŭmencii sian partoprenon antaŭ la 19-a de majo, al kio ni reagos per speciala invitilo. Ni esperas revidi malnovajn geamikojn, kaj bonvenigi novajn.
Koresponda adreso: ***Ton Verwoerd**, Luxemburglaan 545, NL-1966 MJ Heemskerk, Nederlando*

2. Ago-tago en Heemskerk la 21-an de februaro 1996

Por la unua fojo la E-Klubo de Heemskerk (6 knabinoj kaj 2 geinstruistoj) praktikis la internacian Ago-tagon. Antaŭ la evento ili dissendis al 40 adresoj inviton aktive partopreni la Ago-semajnon. Reage ili ricevis vivsignojn el Belgio, Britio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hungario, Japanio, Kroatio, Litovio, Pollando, Usono kaj Uzbekio. La ricevitajn leteraĵojn ili ekspoziciis en la loka biblioteko. Kadre de la malferma ceremonio la infanoj kantis kaj la instruistoj prezentis Mazi en Gondolando kaj per faldfolio oni anoncis komencan E-kurson en septembro 1996. Krome ili dissendis alvokojn al 16 bazaj kaj 3 mezaj lernejoj atenti la semajnon de internacia amikeco. Aperis informoj ankaŭ en gazetoj kaj en la loka radio. *[Sur la foto: Post la kantado de „Sur la tero"]*

Laŭ informoj de ***Ton Verwoerd***



Norvegio

„Edukado - metio - libertempo"

estis la titolo de ekspozicio en Hamar, inter la 23-25-a de novembro 1995. La ekspozicio estis direktita ĉefe al gelernantoj, kiuj venis de Hamar kaj ĉirkaŭaj distriktoj. La Norda Stelo lokis tie standon, kiu montris al la vizitantoj ĉion pri la internacia lingvo: broŝurojn, literaturon kaj oferton de E-kurso. La demandoj pri la lingvo estis multegaj, kaj la gejunuloj fervore studis broŝurojn kaj literaturon, kaj ankaŭ aŭskultis sonbendon kun E-kantoj.

La intereso pri E-o estis kontentiga, entute 54 interesitoj skribis sian nomon sur liston por kurspartopreno, kiu startis komence de la nova jaro. ***Kåre Bye***

(laŭ *Norvega Esperantisto* 6/95)

Pollando

Icem esperanto Renkonto

Ĝi okazos de la 20-a ĝis la 28-a de julio 1996 en urbo Krościenko, 150 km-ojn for de Krakovio (Pollando). La renkonto okazos kune kun la RIDEF (Renkonto Internacia de Edukistoj Freinet). Pri la kostoj de la restado informas la marta numero de ICEM Esperanto. Turnu vin al via nacia Freinet-movado (adresaro en la 77-a numero de ICEM Esperanto) aŭ al:

1) *Secrétariat ICEM, 18 Rue Sarrazin, FR-44000 Nantes, Francio*
2) *ICEM Esperanto, 1 rue Galissonnière, 44330 Le Pallet, Francio*
3) *Felicja Kostow, PL-43190 Mikolow, ul. Krotka 38, Pollando*

Laŭ informoj de *ICEM Esperanto* januaro 1996

Rusio

[Aŭtune 1995 ***Jorma Toropainen*** *(Finnlando) prelegis en du lernejoj de Vyborg (Karelio - Rusio). Ŝiaj impresoj aperis en la 5-6/95-a numero de Esperantolehti. Jen kelkaj fragmentoj de ŝia artikolo:]*

„...Unu lernejo estas la instituto de turismo kaj servado. Ekde la unua jaro la unua deviga fremda lingvo tie estas la angla, sed ekde la printempa sezono de la dua jaro oni povas elekti el inter E-o kaj la germana. Oni diris, ke sufiĉe multaj elektas E-on. Tion ankaŭ mi mem konstatis, kiam venis aŭskulti min pli ol 50 studantoj. En la instituto instruas s-ro Nikolao Petrov kaj s-ino Rozalia Musina.

La alia lernejo, kie mi prelegis, estis mezlernejo, dum la finna tempo *Vanha yhteiskoulu*. En la lernejo funkcias E-klubo, kiun gvidas s-ino Musina. Dek klubanoj kaj kelkaj instruistoj tie aŭskultis min....

Miaopinie nun estus grave, ke la Esperanta semo ĝermu en la lernantoj. Eble troviĝos iu... kiu volas korespondi kun tiuj viborgaj geknaboj aŭ studantoj, komence nur per poŝtkartoj. Oni povas sendi sian adreson kaj aliajn sciojn al

s-ro ***Nikolao Petrov****, Jusnij val 26 kv 5, RU-1888900 Vyborg, Rusio"*

Slovenio

Finiĝis la dujara propedeŭtika eksperimento okazinta en kvar elementaj lernejoj de Aŭstrio, Kroatio kaj Slovenio, organizita de INTER-KULTURO sub la gvido de Zlatko Tišljar. La eksperimento montris, ke la lernintoj de E-o jam unu jaron poste estis en la angla, respektive en la germana 30-35 % pli bonaj ol la nelernintoj, kio signifas ke post du jaroj tiu tendenco kreskas proksimume al 80 %. La kompilita raporto estis sendita al la Scienca Ministrejo de Slovenio kaj al Eŭropunia datumbanko pri sciencaj esploroj.

La nova adreso de INTER-KULTURO:

Besednjakova 1, SL-62000 Maribor, Slovenio, Tel/fakso: +386-62-100669

Ukrainio

Miĥail Genin serĉas mecenaton por eldoni sian E-lernolibron por rusparolantoj. (En Ukrainio mankas lernolibro por parolantoj de la rusa. La manuskripto de la lernolibro havas bonajn recenzojn.) Kontaktu la aŭtoron: ***Miĥail Genin,*** *Jakubovskogo 7-42, UA-252191 Kiev-191, Ukrainio, tel. +44-250-17-15*

Usono

San-Franciska Ŝtata Universitato denove organizas la Someran E-Kursaron inter la 24-a de junio kaj la 12-a de julio 1996. SFSU prezentas novan teamon de instruistoj, kiuj dividas la instruadon - do, la kursanoj profitos diversajn metodikojn kaj kursenhavojn. Ekster la sesioj oni helpos uzi interesajn komputilajn E-programojn.

Kostoj: kurso por tri semajnoj kostas 360 USD. Loĝado kaj manĝado kostas inter 450 kaj 858 USD depende de la loĝkondiĉoj.

Informoj kaj aliĝoj ĉe: *S-ino* ***Cathy Schulze,***
410 Darrel Road, Hillsborough, California 94010, USA Tel. +1-415-342-1796

Reagoj al...

Bernard Golden: Komplika transitiveco - IPR 1,2/95

A) S-ro Golden proponas ke la frazo *A; Li bolas akvon* estu same akceptebla, kiel la frazo *B: La akvo bolas*. Se iu esperantisto, pro kutimo, tamen diras *C: Li boligas akvon*, la signifo, supozeble estas samkiel *A* (ĉar alie eblas miskompreno). Bone por boli! Nun ni prenu la verbon *ĝeni*, ankaŭ foje misuzatan sed, malkiel boli, „tradicie transitiva", kaj faru similajn frazojn: *A: Maria ĝenas min, B: Mi ĝenas*. Miaj komentoj: Kion signifas: *Ĉu vi opinias ke mi ĝenas?* Se la frazo *C: Maria ĝenigis min* samsignifu kun *A* (laŭ nia antaŭa regulo) esperantistoj „tradiciaj", kiuj lernis ke ĝeni estas transitiva verbo, miskomprenas. La frazo - *D: Maria ĝenas pro mi* - fariĝas sufiĉe dusenca (eĉ pli se oni provos 'anstataŭigi la prepozicion per akuzativo'!) ***Mike Sadler***

B) Mi trovas aktuala la penadon de Bernard Golden por trovi solvon konsidere de la problemo de transitiveco (95/1-2). Tiu penado estas aktuala, ĉar Eŭropa Unio (EU) baldaŭ devos trakti lingvan problemon kaj devos elekti el inter du ebloj: a) ĝi gardu plu la ĝis tiam sekvitan principon, t.e. la egalrajteco de membroŝtatoj kaj lingvoj - aŭ b) ĝi apliku alian solvon.

En la kazo a) Esperanto havas iom bonan ŝancon por iĝi oficiala lingvo en EU. (Por tio agadas esperantistoj - inter ili agadis nia karmemora samideano Edward Symoens - kaj organizoj en Eŭropo.) Ĉi-kaze fariĝos aktuala, ke: *"Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la r e g i s t a r o j de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan*

*vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj;..."** Ankoraŭ en tiu kazo, se la politikistoj de EU akceptus Esperanton, la iom plena realigo de la enkonduko de E-o bezonus plurajn jarojn, eble jardekojn. Sed la kontrolon de la lingvo oni devos plenumi jam ĉe la komenco de la enkonduka procezo. Ĉi tie mi parolis pri la aktualeco de la solvo-serĉado sed ne pri la kielo.

László Gados, *Budapeŝto*

*Zamenhof: Antaŭparolo de la Fundamento de Esperanto. Enciklopedio de Esperanto, Hungara Esperanto-Asocio Budapest, 1979. p.163.

Géza Kurucz: Pri la uzo de substantivaj participoj - IPR 4/95

A) Ŝajnas al mi ke kiam participo estas samtempa „daŭra rolo" la afero fariĝas iom tikla: ĉu vere estas ĉiam pli bone diri „prezidinto" ol „eksprezidanto" kaj „aminto" anstataŭ „eksamanto"? ***Mike Sadler,*** *Gyál (Hungario)*

B) Estas dankinde, ke Géza Kurucz tiom funde esploris la tempan sistemon de Esperanto modele de substantivaj participoj. Per tio li bonvene atentigas pri la ebleco, plene nuance esprimi temporilatojn en la uzado de particip-devenaj derivaĵoj. Ĉu li konas la verkojn de Rikardo Ŝulco, kiu same insistas pri la valideco de la Zamenhofaj participaj tempoŝtupoj? La Kurucza frazo - plene konsentinda - sonas rekte Ŝulce: "Estas konstateble, ke -anto/ -into / -onto (same: -ato/ -ito/ -oto) esprimas klaran tempan rilaton ne al la aktuala tempo de la parolo, sed al tiu de la predikato." Ĉe Ŝulco: "...rilatas al la priparolata tempo."

Estus interese ekscii, ĉu sinjoro Kurucz transigas sian eltrovon ankaŭ al la verbaj temporilatoj (-ata/ -ita/ -ota). Se jes, li tiel atentigus la kolegojn instruistojn pri eĉ pli vasta, pli grava kampo de temporilatoj, instigante al la klara, logika temposistemo Zamenhofa, listigita en la 16 reguloj. Tiel ni precize scius, ke, ekzemple, persono en iu tago estis (jam) naskita aŭ (tiutage) naskata. Ne iu adepto de la Analiza Skolo predikus, sed sperta Kecskeméta esperantisto propralogike gvidus al pli logika tempouzado en Esperanto...

Franz-Georg Rössler, *Dudenhofen (Germanio)*

C) Estas akceptinde, ke Géza Kurucz atentigis nin pri la utileco de substantivaj participoj (95/4). Tamen la ekzemplo, per kiu li komencis la pritraktadon de la temo, estas maltrafa rilate la juĝon de li ("ekslernantoj estas barbarismo"), sed estas trafa pro tio, ĉar ĝi povas demonstri al ni, ke okaze de kelkaj verboj, la substantiva participo havas ne nur tempan rilaton sed ankaŭ rilaton de ia kvalito (de ekzistado). Konkrete: a) *Manĝanta homo estas manĝanto*. En tiu ĉi kazo ni trovas (nur) tempan rilaton. b) *Lernanta knabo estas lernanto*. En tiu ĉi senco ankaŭ tempa rilato esprimiĝas. Sed ĉu ni rajtas diri/skribi ke: *"Hieraŭ Ia*

lernanto(j) ekskursis"? Kompreneble, ni rajtas diri tion kaj similaĵon, ĉar ĉikaze *'lernanto'* signifas: persono/knabo, kiu devas aŭ rajtas frekventi lernejon. Pro tiu senco ni rajtas uzi la prefikson *eks-* rilate la vorton 'lernanto', kaj pro tio ni trovas en PIV la zamenhofan ekzemplon (sub la kapvorto eks-): *eksservanto*[z]. Plue: la proponita solvo „*lernintoj de la klaso*" semantike ankaŭ pro tio ne estas bona, ĉar la senco de *'klaso'* laŭ PIV: *"...3. Aro el ĉiuj lernantoj, kiuj sekvas unu saman kurson*". Sekve kiam la studado (la kurso) atingas sian finon, la ekzisto de la klaso ĉesas. Do, *'lernintoj de la klaso'* povas esti nur tiuj personoj, kiuj dum la lernojaroj - do, dum la ekzisto de la klaso - eksiĝis el la klaso. Sekve, rilate la ekzemplon, cititan de Géza Kurucz, la vorto *'ekslernantoj'* estas pli bona ol la vorto *'lernintoj'*. ***László Gados**, Budapeŝto*

János Petik: Serve de altaj pretendoj - IPR 4/95

A) Ĉu tia por-mi-tute-ne-nature-sona kaj malfacila akrobatigo de la vortoj vere rezultigas pli bonan lingvon ol la laŭ-mi-ne-sklave-nacilingvaj manieroj reliefigi kiujn uzas niaj bonaj verkistoj kaj la kursivado/substrekado kiujn foje uzas ordinaruloj kiel mi? ***Mike Sadler**, Gyál (Hungario)*

B) Konstateble estas, ke la aŭtoro troviĝas en krizo rilate al la lingvo Esperanto. Elirpunkto estas lia konstato, ke Esperanto estas "tro vulgara por atingi la nivelon de literatura lingvo". Tial sinjoro Petik provas plibonigi nian (literaturan) lingvon per du rimedoj: Pri la dua estas almenaŭ interese legi lian atentigon pri ĝusta vortordo en Esperantaj frazoj. Jes, ni ĉiuj foje facilanime tordas la vortojn en frazo, sekvas nacilingvajn modelojn. Sed ĝenerale almenaŭ skribe ni atentas emfazojn, akcentojn, rango-ordojn. Ke tio ne povas atingi centprocentan universalecon, tion la aŭtoro mem konstatas. Ekzemple ne ĉiu kulturo metas la plej gravan diraĵon en la saman lokon. Tiu povas troviĝi frazokomence aŭ frazofine. Sed preskribi rigoran sistemon de vortordo estus troiga balasto. Kaj la Petikaj ekzemploj donas nur modelojn, kiajn niaj konsciaj verkantoj jam delonge utiligas. Cetere ĉe li la plej emfazita vorto troviĝas (arbitracie) fine de la frazo.

Pri la unua rimedo mi ne nur dubas, sed firme kontraŭstaras, ĉar la aŭtoro provas (ankaŭ per la ĝena daŭra utiligado en la tuta teksto) enkonduki la nedifinan artikolon "un". Kvankam mia propra lingvo disponas pri nedifinaj artikoloj, mi neniam sentis ties bezonon en Esperanto. Sincere dirite, mi tute ne komprenas la aŭtoran argumentadon per la aldonitaj ekzemploj en la studaĵo. Sed la afero dependas ne de miaj lingvosentoj, sed de la baza regularo de la lingvo Esperanto. Ĝi simple rezignas pri nedifina artikolo. Ankaŭ la erara Zamenhofa frazo en la "Ekzercaro" (*"Unu virino havis du infanojn..."*) ne pravigas ĝin. Kaj certe de la nedifina artikolo ne dependas la kapableco "esprimi la plej delikatajn nuancojn de la homa animo".

Bonaintence verkis sinjoro Petik, sed neutile. Sufiĉas esplori kaj utiligi la latentojn de la 16 reguloj. Modifojn, modlaĵojn aldoni certe multaj esperantistoj jam emis/-as/-os. Sed maĵorie ili rezignas pro respondeco al la tuto. Kaj ankaŭ la organo de esperantistaj instruistoj devus rezigni publikigi reformprojektojn, precipe se ili estas kontraŭ-Fundamentaj kaj evidente nenecesaj.

***Franz-Georg Rössler**, Germanio*

Dennis Keefe: BEKunu, BEKdu... - IPR 4/95

en la intervjuo li prave atentigas pri la fakto, ke oni bezonas multe pli da tempo por lerni kaj bone uzi E-on ol multaj e-istoj ofte opinias. Kaj tio validas des pli, ju pli ofte fakuloj kuraĝas senvualigi la gramatikajn malfacilaĵojn kaj demonstri la malkontentigajn spertojn. Pro tio mi salutas la instrumetodajn konsilojn kaj ekzemplojn, kiun la intervjuito donas. ... Same pro samaj motivoj mi dankas pro la rubriko „*El niaj metiejoj...*" ***Hans Fechler***

Petro Rulofido: La Malfacila Esperanto - IPR 4/95

En la rubriko „Reagoj" mi denove preskaŭ devis rezigni. Se esperantisto, kiu konfesas, ke „la lingvistiko kaj gramatiko ne apartenas al lia profesio" eĉ kiel nura amatoro sukcesas malkovri tiom da malklaraĵoj kaj da ankoraŭ ne deciditaj demandoj, kian nesolveblan taskon havas la Akademio!!

Por ekzemplo: kial oni tiom ofte renkontas „pruntendoni, pruntenpreni" kaj ne simple „prunte doni, prunte preni". Ĉu estus ĝuste - analoge al tiu ĉi formo - skribi „li boneregas E-on", „ŝi tiom belekantis la himnon"? Kiu regulo permesas kaj regulas tiun ĉi kunmetaĵon? Tion demandas miaj gelernantoj kaj konstatas, ke ankaŭ E-o ne estas lingvo sen esceptoj. Kontraŭe al la aserto de Rulofido la germanaj tradukoj por **prunti** en UV „leihen, borgen" ne estas transitivaj. „Leihen" same kiel „borgen" per si mem solaj ne donas la precizan finan sencon: „ich leihe/borge mir" (mi pruntas al mi = mi prunte prenas de iu ion) aŭ „ich leihe/borge ihm" (mi pruntas al li = mi prunte donas al iu ion). „Prunte" signifas „leihweise/auf Borg" (adverbo).

La radiko „prunt" en mia praktiko ĉiam indikas, ke mi laŭ certa maniero prenas, donas, aĉetas ion; mi ĉiam uzas ĝin en adverba senco. Do neniu cerbumo, ĉu tr. aŭ ntr. ...

Ankaŭ en la rusa traduko en UV „взаймы" estas - same kiel en la germana traduko en UV - ankoraŭ dusenca kaj postulas decidon inter „взаймы да(ва)ть" prunte doni, aŭ „взаймы брать" = prunte preni (atentu, ke ankaŭ la rusa lingvo ne kunmetas la du elementojn de la esprimo).

Timega fantazio estus la apero de vortaro, kiu ĉe ĉiu radiko indikus ĝian gramatikan karakteron, kvalifikus ĝin per aldonaj informoj, dirus, ĉu ĝi estas ĉie akceptita aŭ kiuj alternativoj ekzistas kaj ankoraŭ estas diskutataj; kiu krome indikus la (ne)transitivecon (kun proponitaj alternativoj) kaj ankaŭ la aspektan verbokategorion laŭ PAG.

Mi preferas lerni kaj lernigi 'vortojn' - tiom ofte kiom eblas - en tipaj kombinaĵoj, kiuj ofte aperas en teksto kaj parolo. Do ne „fermi, tr.", „ĉesi, ntr.", sed „fermi la pordon", „la pluvo ĉesas" k.s. PIV estas trezoro, kiu povus liveri, jes, ankaŭ indikojn pri 'tr.' kaj 'ntr.' - sed pli valore por nia lernado estas ĝia abunda stoko da vortkombinaĵoj kaj frazeroj, kiuj montras la vortojn 'agantaj'. Do, la eblecoj de interligo kun aliaj vortoj ne bezonas esti prinotitaj per aldonaj indikoj pri radik-karaktero, (ne)transitiveco, aspekta

kategorio k.s., sed ili jam montriĝas realigitaj, agantaj, en kuntekstoj kaj situacietoj. Ili sin ofertas kaj prezentas senpere aplikeblaj.
Krome, ne interesas min, ĉu verbaj formoj kiel porekzemple 'varmas, feliĉas, belas, verdas, bluas...' estas „verboj netransitivaj derivitaj de neverbaj radikoj". Pli interesas min la rilato de tiuj ĉi esprimiloj al tio, kion oni volas esprimi, do la rilato inter la ila ebeno de 'esprimo' kaj la informa ebeno de 'enhavo' (laŭ L. Hjelmslev, vidu ankaŭ U. Ecco.)
Ŝajnas al mi, ke la fascinaj eblecoj por kunmetaĵoj, derivaĵoj en E-o havas ankaŭ duan, ne tiom fascinan flankon: ili estas tento por ludado nur sur la 'ebeno de esprimo'. Tio produktas 'interesajn' formojn, prefere mallongajn kaj 'rapidajn', pli ekonomiajn: sekve de tiu ĉi tendenco la ĉielo ne plu estas blua, sed ĝi bluas; la ĉambro ne plu estas varma, sed ĝi varmas; la arbo verdas... Ĉar tiuj ĉi formoj svarmas, mi ne plu havas la eblecon trovi iun laŭsencan (ebeno de enhavo) diferencon inter la esprimo „la ĉielo bluas" kaj „la ĉielo estas blua". Tio signifas, ke mi perdis la esprimilon por komuniki mian dumpromenan sperton kaj impreson, ke la bluo de la ĉielo estis tiom viva, tiom intensa, kvazaŭ la ĉielo agus, produktus sian bluon. La esprimo „estas blua" tute ne taŭgus, ĉar ĝi esprimus nur la staton, ne la spertitan kvazaŭan aktivecon de la ĉielo en tiu ĉi dumpromena momento.
Novaj esprimiloj, vortformoj devus servi al la 'enhava ebeno'; diferenco inter esprimoj devus nepre respeguli diferencon sur la ebena senco. Laŭ mia impreso ni suferus grandan perdon, se tiu vaste spertebla verbigo de adjektivoj estus libera (eble 'senbrida'?) agado nur sur la ebeno de la 'iloj', se do (r)estus neniu sencodiferenco porekzemple inter 'estas varma' kaj 'varmas'. E-o permesas multe da ludado - sed ĉio havas sian duan flankon, sian prezon.
***Hans Fechler**, Alfelderstr. 9. DE-31139 Hildesheim, tel/fakso: +49 5121 41294*

Mireille Grosjean: „IPR estas nelegebla" - IPR 1/96

Mi havas publikajn demandojn al s-ino Mireille Grosjean konsidere de ŝia kritiko (96/1): Ĉu mia skribaĵo ricevus prijuĝon pli altan aŭ malpli altan, ĝi fariĝus pli valora aŭ malpli valora, se post mia nomo starus la vortoj: emerita oficiro? Ĉu vere de tio estas (pli) legebla IPR, ke post la nomo de aŭtoro estus trovebla la profesio? Ĉu ia antaŭjuĝo ne kaŝas sin malantaŭ tiu deziro?

***László Gados**, Budapeŝto*

Leterkesto

A) „...Al mi plaĉas la ideo de Hans Fechler, kiu deziras rubrikon kun 3-4-liniaj reagoj de legantoj pri la materialoj de la revuo. Tio mankas. Kial?...
Laŭ mi la revuo ne devas doni sian spacon por la artikoloj, kiuj ne rilatas al pedagogiaj aferoj. Sed ili regule aperas.... Mi estas kontraŭ eĉ prilingvaj, tro teoriumaj, multpaĝaj diskutejoj, tiuj de B. Golden, G. Kurucz, J. Petik, P. Rulofido. La artikoloj estas tre interesaj kaj necesaj, sed ili devas aparteni al ĉiuj esperantistoj, ne nur al pedagogoj. Eble por ili taŭgus pli *Heroldo* aŭ *Esperanto*... S-ro Hans Fechler skribas: „estas tre alloga por mi la rubriko *El landoj kaj sekcioj*". Mi plene konsentas kun li. La informoj de la rubriko ne nur

donas superrigardon, sed ili incitas al imitado de la bonaj aferoj, vokas al kunagado..."

***Eŭgeno S. Perevertajlo**, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS*

B) „Mi tutkore dankas al vi pro la regula ricevado de IPR, kiu informas min pri la diversaj problemoj de E-instruado, pri la agado de E-instruistoj el la mondo. La revuo helpas al ni, ĉar pro la altiĝo de la kostoj de eldonado de E-revuoj ni ne plu kapablas aboni ilin. Se viaj financaj rimedoj permesas, mi petas vin sendi ĝin daŭre. Mi disdonis la revuon en la tuta lando. Ni promesas informi vin pri nia E-agado, pri niaj spertoj en la instruado de E-o."

*prof. **Florica Popa**, str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara, Rumanio*

C) „Kiel regula leganto de via periodaĵo mi rimarkis, ke ĝi ne havas ISSN-numeron. Mi forte rekomendas al vi havigi al vi la tre utilan ISSN-numeron ĉe via nacia centro, kiu verŝajne troviĝos ĉe via nacia ĉefa biblioteko. Ĝi estas komparebla kun la ISBN-numero por libroj. Nur per tiu numero via periodaĵo eniros en la diversajn katalogojn de periodaĵoj, bibliografiaj informiloj k.s.
En Germanio mi rimarkis, ke estas tre facile akiri la ISSN-numeron. Ne ekzistas iuj kondiĉoj rilate al enhavo, eldonkvanto, aperritmo, amplekso k.s. Oni devas nur sendi po eldono du ekzemplerojn al la germana registra biblioteko en Frankfurt/Main. **Sen ISSN-numero via periodaĵo restos ekster la profesie registritaj eldonaĵoj.**"

*D-ro **Detlev Blanke,** Otto-Nagel-str. 110. D-12683 Berlin, Germanio*

D) „En kelkaj revuoj kaj broŝuroj de nia movado mi legis la opinion ke oni devas devigi lernantojn lerni E-on. Tiel oni povus pligrandigi la nombron de parolantoj de nia lingvo, almenaŭ tia estas la penso de la apogantoj de tiuj ĉi aranĝoj. Sed mi devas averti vin ke vi , tiel agante, faras la futurajn malamikojn de nia kara lingvo. Se vi nepre devus manĝi prunojn, ĉu vi tiukaze ŝatus la prunojn? La respondo al la demando estas klara, mi pensas. Verŝajne al la plimulto de la lernantoj E-o estos nur ekstra ŝarĝo. Ili ne havos plezuron, kaj ili malŝatos nian lingvon eterne. Nur kelkaj lernantoj iĝos fervoraj anoj de nia movado, sed por ili oni ne bezonas aranĝi devigitajn lecionojn, ĉar ili verŝajne aliĝus ankaŭ sen tiaj aranĝoj. Se ni faras la kalkulon, certe la nombro de malamikoj superos la nombron de novaj amikoj, do la supozata profito fakte estos malprofito al nia movado. La apogantoj de tiaj aranĝoj forgesas ankaŭ tion, ke nia movado (ankoraŭ) ne povas liveri sufiĉan kvanton de instruistoj de nia lingvo. Komparu la okcentmil lernantojn al la mil aktivaj esperantistoj.
Resume: ni neniam devas devigi aŭ altrudi nian lingvon al aliaj personoj, ĉar tiel ni neniam vere gajnos ilian koron. Ni mem ne devas agi tiel kiel multaj defendantoj de naciaj lingvoj (ekzemple la franca lingvo), ni ne devas uzi iliajn metodojn kiuj fakte estas speco de subpremado." ***Frans Cobben**,*

Artilleriestraat 87, NL-4611 GC Bergen op Zoom, Nederlando

ALVOKOJ

Donacu al ILEI-Kasoj (ILEI-konto ĉe UEA: ilek-a)

koleghelpa kaso - ebligas la membriĝon de E-instruantoj el malriĉaj landoj (ĉiujare oni membrigas kelkdekon da membroj)

konferenca kaso - subvencias la partoprenon al ILEI-Konferencoj al malriĉaj membroj kaj aliaj E-instruantoj

ekzamena kaso - ebligas la ekzameniĝon de esperantistoj el malriĉaj landoj kaj esperantistoj kun specifaj bezonoj

Helpu E-instruadon

Ĉe la sekretario de ILEI troviĝas listo de petoj pri lernolibroj kaj aliaj instruiloj el pluraj landoj. Ĉiuj, kiuj pretas helpi, kontaktu la ILEI-sekretarion.

Marija Beloševiĉ

EKZAMENSESIOJ

11-12.05.96 Zagrebo, Kroatio (elementa - E, meza - M)

05-10.07.96 32-a Brazila E-Kongreso. Aliĝadreso: Instituto François Lamasson, Rua Americo Brasilionse 1418, BR-Ribeirão Preto, 14015-050 , Brazilo (E,M)

20-26.07.96 LIBE Kongreso, Ĉeĥio. Aliĝadreso: Nora Moerbeek, Zwaans-meerstr. 48, NL-1946 AE Beverwijk, Nederlando (E,M)

julio Lome, Togolando (E)

20-27.07.96 81-a Universala Kongreso, Prago, Ĉeĥio (E,M) *kaj*

27.07-02.08.96 30-a ILEI-Konferenco, Tábor, Ĉeĥio. (E,M)

06-11.08.96 5-a Kultura E-Festivalo, Kopenhago, Danio (E)

10-16.08.96 Somerlernejo en Barlaston, Britio (E,M)

22-25.08.96 1-a Azia E-Kongreso, Ŝanhajo, Ĉinio (E,M)

23-30.08.96 1-a E-Kongreso de la HO kaj Orient-Afrikaj landoj (E)

decembro, Lome, Togolando (M)

Aliĝadreso: *Ivan Bekavac-Basiĉ, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, Kroatio*

Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI '95 (kompletigo)

E-renkontiĝo, urbo	kandidatoj		landoj	sukcesis	
lando, monato	elementa	meza		elementa	meza
En IPR 1/96 sume	26	27		20	18
Chengde, Ĉinio, nov.	45	7	1	34	7
Kpele-Govie, Togo	-	3	2	-	-
	71	*37*		*54*	*25*
	108			*79*	

Nur unu sesio ne okazis: Kubo (novembro)

Sukcesintoj laŭ landoj: Britio - 2, Ĉeĥio - 1, **Ĉinio - 41**, Danlando - 1, Finnlando - 1, Francio - 2, Germanio - 2, Hispanio - 5, Italio - 3, Izraelo - 1, Kroatio - 3, Kubo - 1, Litovio - 1, Nederlando - 1, Rusio - 2, Rumanio - 1, Svedio - 4, Senegalo - 1, Slovenio - 1, Taĝikio - 1, Togo 4. *prof.* ***Ivan Bekavac-Basiĉ,*** *Sekretario de la IEK*

EŬROPA POEZIO EN ESPERANTO

Eldonaĵo *Eŭropa Poezio en Esperanto* pasigas jam sian duan jaron. Ĝi ricevis subtenon de **FAME-fondaĵo**, tial la abonantoj ĉi-jare pagas tri kaj ricevas kvar kajerojn, jarkolekton. Jarabono al Budapest 260, al provincoj 310 HUF, al najbaraj landoj de Hungario 5, al nenajbaraj landoj 7 IRK - inkluzive la poŝtkostojn. Jarkolekto de 1995 kostas 320 HUF, aŭ 5 IRK. En la lasta numero estas belorusa, norvega, slovena kaj hungara paĝoj kun multaj poemoj konvenaj por deklamkonkursoj. Mendu, aŭ petu provekzempleron per 1 IRK (aŭ 80 forintoj en poŝtmarkoj) ĉe

D-ro Miklós Fehér, *HU-1046 Budapest, Ugró Gyula u. 17., Hungario*

KELKAJ PEDAGOGIAJ LEGINDAĴOJ EN ALIAJ REVUOJ:

Antanas Mekys: Kiel mi lernis kaj instruis Esperanton, ***Litovia Stelo*** 4-5/95
(multaj pedagogiaj spertoj kaj (movad)historiaj memoroj ekde la jaro 1933)

Sun Aijun: Aktivulo de Esperantujo, ***El Popola Ĉinio*** 1/1996
(ilustrita artikolo pri la vic-sekretario de ILEI, prof. Zhang Danchen)

Povilas Jegorovas: Retrospektive al la jaro 1995, ***Litovia Stelo*** 1/1996
(la prezidanto de LEA informas nin i.a. pri la instruado de E-o en Litovio)

Mazi superis ĉian optimismon - *intervjuo kun Roman Dobrzynski, reĝisoro de la E-kurso Mazi en Gondolando,* ***Esperanto*** 1/1996

Roman Dobrzynski: Kiel Mazi lernis E-on, ***Kontakto*** 6/1995
(Detala artikolo en facila E-o pri la instrukompleto, ĝia produktado, kun multe da metiejaj sekretoj kaj fotoj.)

Gabriella Ősz: Pri Andreo Cseh. *Similecoj...kun du samtempaj pedagogoj Baghy kaj Freinet,* ***i. c. e. m. esperanto*** 1/1996

Mauro La Torre: Ĉu instruistoj interkompreniĝas? ***Esperanto*** 2/1996 *(pri terminologio - „por ke la termino estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia")*

Renato Corsetti: Eŭropa ILEI: montru vin! ***Esperanto*** 2/1996
(por krei eduk-projekton financeblan de Eŭropa Unio)

Gabriel' Aquilina: „Italanto" ***Esperanto*** 2/1996
(pri la seminarioj de la Roma katedro de Itala E-Instituto)

Propedeŭtika instruado, ***Heroldo de Esperanto*** 26. marto 1996
(artikolo pri la eksperimenta projekto de la itala lernejo Salvemini, en Torino)

Gados László: Ki volt Cseh András?, ***Élet és Tudomány*** 1996/5 *(hungarlingve)*

SEKRETARIO DE ILEI EN BELGIO KAJ NEDERLANDO

La sekretario de ILEI dum sia vizito al Belgio kaj Nederlando renkontiĝis kun la sekciestroj kaj pluraj ILEI-aktivuloj. Ĉefa diskutpunkto rilatis al la eŭropa agado de ILEI. La sekciestroj en tiuj du landoj estas pretaj provizore zorgi pri la Laborkomisiono „Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj" pri kiu ĝis sia morto zorgis s-ro Symoens. Pri la eŭropa agado de ILEI oni

pridiskutos dum la ĉi-jara Konferenco, kiam estos prezentota raporto pri la ĝisnuna agado kaj laborplano. La sekciestro de Nederlando informis, ke la membroj de la sekcio decidis jure malfondi la sekcion kaj ekesti parto de *Esperanto Nederland*. La sekretario de ILEI vizitis ankaŭ la IEI kie la ĉefgastiganto estis s-ino *Mila v.d. Horst Kolinska*. Ambaŭ flanĥoj esprimis la kontenton pri la ĝisnuna kunlaboro kaj esperas je fruktodona daŭro de la kontaktoj kaj konkretaj programeroj ambaŭflanke. Fine de sia restado eksterlande, la sekretario partoprenis la UEA-estrarkunsidon. La Estraro daŭre subtenas la agadon de ILEI diversmaniere. Ĉi-jare UEA volonte represos la Gvidlibron por la elementa kaj meza ekzamenoj. ***Marija Beloševiĉ***

Recenzoj

Comprehensive English-Esperanto Dictionary,

Peter Benson (1940-); ELNA, 1995. 607p. ISBN 0-939785-02-1 (firme bindita); 0-939705-03-X (kartone).

Stefan MacGill:

Jen ampleksa nova unu-direkta vortaro de la angla al Esperanto. Ĝi gravas al edukistoj ne nur ĉar angla-lingvio vastas, sed ankaŭ ĉar tia vortaro estas la sola eniro al nia lingvo por tiuj, kiuj entute ne havas al-esperantan vortaron el sia denaska lingvo (aŭ havas sed nur malgrandan aŭ netaŭgan) kiuj tamen posedas la anglan kiel ne-denaskan lingvon. Aperis recenzoj pri la verko (Esperanto, okt. 95, p. 172-73) kun reago (jan 96, p. 8).

Sen detala analizo de la tuta enhavo, mi spuras tri ĉefajn punktojn, kiuj meritas laŭdon, kompare kun aliaj similaj verkoj:

1) Ĝi indikas la transitivecon (aŭ ne) de donitaj esperantaj verboj, por ke uzanto havu indikon pri la taŭga uzo, eĉ se specifa ekzempla frazo ne aperas.

2) Anglaj vortoj fifamas pro la multeco de signifoj. Ne nur vorto povas senŝange alpreni alian gramatikan kategorion, (tipe substantivo kaj verbo) ĝi povas havi timigan kvanton da malsamaj samkategoriaj signifoj. La vortaro per anglaj signifo-precizigoj stiras uzanton al la elektenda esperanta vorto. Ekzemple sub kap-vorto **bear** necesas elekti el: urso, subporti, elporti, rezisti, trasuferi, toleri, naski, postuli, fronti, celi, turniĝi, rilati al. La klarigoj helpas eviti groteskaĵon kiel (vera!) ekzamena traduko (vortaroj permesitaj) de *The other ship came* kiel *La alia eco venis.*

3) La angla estas idiom-svarma lingvo, la vortaro traktas multegajn, plejofte bone, foje trafe, ja kelk-kaze anglisme. Bonas ekz. *Through thick and thin* (Tra diko kaj maldiko) = Tra ĝojo kaj malĝojo). Multaj kap-vortoj (ekz. **clear**, **head**) okupas tutan kolumnon, kun pli ol tridek idiomoj katalogitaj.

Jen ekzemplo, kiu kombinas ĉiujn punktojn: **hide** (conceal) kaŝi (tr.); (of animal) felo; **hide-and-seek** (kaŝ-ludo); **hidebound** (narrow-minded); mallarĝ-anima, etanima.

Plie ĝi dediĉas spacon al klarigoj de gramatikaj diferencoj inter la angla kaj Esperanto. Ekz. *They say that...* estu *Oni diras, ke...* krom se *They* rilatas al klare difinitaj homoj. Sub **have** oni ricevas atentigon pri ĝia rolo kiel help-verbo, kune kun gamo de plej tipaj ekzemplaj frazoj, kiel trafe traduki ilin. Danĝeraj falsaj amikoj estas markitaj, ekz. **convenient:** oportuna (*ne* konvena). Ĝi atentigas pri malsimilaĵoj inter usona kaj brita uzo, ekz. **Subway:** (US: underground train): *metroo* kaj (GB underpass) *subvojo.*

Post tiuj ĝeneralaj komentoj mi transdonas la vorton al sam-lingvo-par-ano, kiu faris pli detalajn esplorojn de la verko. ***Stefan MacGill***

Mike Sadler:

La kompilado de tiel granda vortaro estas ĉiaokaze gratulinde heroa farego, des pli ĉar ĝi plenumas siajn pretendojn. Cele al pli bona dua eldono, mi mencios ĉefe aferojn, kiujn mi opinias plibonigeblaj.

1) Plaĉas la kapvortigo ne nur de komunuzaj nomoj de bestoj kaj plantoj sed ankaŭ ties latinaj nomoj (CEED prave diras ke la latinaj estas malpli konfuzaj). Mi testis per tri plantoj kaj tri bestoj. Bone funkciis ĉe lekanteto, leontodo, muŝo kaj hundo. Ĉe la komunuza kapvorto **cleavers** (*L. Galium aparine*:ofta en Eŭropo — ĝiaj folirondoj gluiĝas al vestaĵoj) staras: *Galio*. Tiu estas genro kiu enhavas ankaŭ aliajn oftajn speciojn inkl. Galium Odoratum kiu aperas en CEED (kaj PIV) nur sub ĝia multe pli ofta (trovebla nur en la kvara florlibro konsultita!) latina nomo Asperula odorata = odora asperulo. La kapvorto **Galium** tute mankas en CEED. Laste mi serĉis pri la monta/neĝa (PIV nordlanda) leporo L. **Lepus timidus**. Vane, ŝajne tute mankas en CEED — kvankam laŭ mia bestolibro ili nemalmultas en Nordameriko. Sub la kapvorto **Lepus** CEED diras: leporo; lepus cunikulus, kuniklo. Kvankam ankaŭ PIV opinias, ke kuniklo estas latine *Lepus cuniculus*, la eŭropa kuniklo (almenaŭ) estas, en ĉiuj libroj, *Oryctolagus kunikulus*!

2) CEED kelkfoje ne donas tre ofte uzatajn kunmetajn solvojn. Sub kapvorto **Thumb** jen polekso, sed ne dikfingro; **hostage:** ostaĝo, sed ne garantiulo; **suspense:** suspenso, sed ne streĉo aŭ simile; **feed:** nutri, sed ne manĝigi.

3) Malgraŭ abundo da trafaj kaj plaĉaj tradukoj (ekz. *tuck a baby into bed* = nestigi bebon en la liton; *let sleeping dogs lie* = ne blovu en abelujon; *bloomers* = pufkalsono), kelkaj impresis min anglisme (parentezoj miaj): **power tool** (mantenata ilo helpata de ekstera energio, ekz. elektra borilo) = pova ilo. **Pipe dream** (nerealigebla plano/espero) = pip-sonĝo (pro opio-fumado, do kial ne opio-songo/revo?) **Condominium** (apartamentaro kun kelkaj kunposedaj ejoj) = *kundomaro* (do *kunapartamentaro* aŭ *kunloĝejaro?*). **Umpteen** (multegaj, ekz. farendaĵoj) = *dek um* ! **Jillion** (ege multegaj!) = *umiliono* ! **Have a good time** = *ĝui sin* (kvankam sub **enjoy yourself** CEED donas la pli oportunan *amuziĝi*). ***Mike Sadler***

[NdlR - Pli da komentoj en la sekva numero!]

Pero Ĉimbur: Mi resanigis PPPetron

1995 MZ-Verlag (Trad. Lucija Borĉiĉ)

La verkinto honeste atestas en sia 132-paĝa romano la sukceson de la aŭtogena trejnado kontraŭ lia balbutado kaj tial esperigas la balbutantajn legantojn.

Jen la trafa postparolo de Prof. D-ro Bosko Popoviĉ : "La libro estas verkita per facila, simpla lingvo kaj riĉigita per aro da homaj travivaĵoj, situacioj kaj anekdotoj el la ĉiutaga vivo. Super ĉio, tiu ĉi verko instigas kaj plifirmigas la fidon al la persona kapableco de ĉiu, kiu decidiĝos kontraŭstari la balbutadon."

La aŭtoro interplektas la teoriojn pri balbutado kun sentoj el la infanaĝo de Petro. Ambaŭ estas iom post iom priskribitaj laŭ la vojiro de tiu 40-jara balbutulo ĝis lia resaniĝo per precize priskribita terapio.

La romano komenciĝas per "la unua flugo" per aviadilo al simpozio pri balbutado en Dubrovnik. Sekvas "la dua flugo" kun la decido provi la kuracmetodon de Pavel Rotkiewicz. En "la tria flugo" vi travivos sep tagojn da terapio per la aŭtogena trejnado. Poste venas la "Alteriĝo", „La aliaj tagoj aŭ La vivo sen balbutado"; fine "Reagoj - leteroj kaj interparoloj".

Mankis al mi nur ia prezentresumo por ekde la komenco kompreni, ke temas pri reala kaj sincera raporto, pri membiografia atesto.

(La asertoj pri la etiologio kaj la kuracmetodoj de la balbutado veras laŭ miaj jusaj esploroj.)

***Francoise Noireau**, instruistino*
Briançon, Francio

Postparolo

En la sekvaj numeroj aperos: *Harald Schmitz*: Esperanto en la lernejo kaj *Li Yusheng*: Kiel apliki regulecon pri scimemoro en instruado.

***Redaktofino por tiu ĉi numero**: la 15-a de aprilo 1996, **por la sekva**: la 15-a de aŭgusto. Mi petas la koncernulojn, ke ili sendu la konferencajn raportojn tuj post la Konferenco en Tábor. Du semajnojn antaŭ la redaktofino nia redakcio jam korektas la provpresaĵojn, dum tiu periodo la enhavo jam ĝenerale ne ŝanĝiĝas, tiam ni preferas akcepti nur modifojn, mallongajn aŭ urĝajn informmaterialojn.*

Mi aĉetis faksmodemon: se mi estas hejme, mi povas akcepti faksojn. Mia komputilo aŭtomate registras faksojn, se ĝi funkcias. Se la komputilo ne funkcias, provu la faksadon 2-3 minutojn post la unua provo. (Atentu, se mi ne estas hejme, vian fakson false „registras" la respondaparato.)

Por eviti eventualajn miskomprenojn aŭ perdiĝon de la fakso mi proponas, ke vi avertu min antaŭe telefone, aŭ sendu la fakson inter 21.^{30} kaj 22.^{10} (laŭ mez-eŭropa tempo), kiam mi - kutime - estas hejme kaj la komputilo funkcias.

Jozefo Németh

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
Argentino: Teresita Alaníz, Hipólito Yrigoyen 2578 P5 Dto 30, AR-1090 Capital Federal
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien
Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin de Thural, FR-74920 Combloux
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn
Hispanio: vakas
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa
Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, 181 Japan
Koreio: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Kroatio: Ivan Bekavaĉ-Basiĉ, Kušlanova 59. HR-10000 Zagreb
Kubo: H. Jiminéz, Vista Alegre 254 e/J.B. Zayas y Luz , Caballero, Víbora, CU-11500 C. Habana
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL- 1704 BH Heerhugowaard
Nordameriko: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, N-3135 Torod
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw
Portugalio: João Santos, p-a Portugala Esperanto-Asocio. Rua Dr. João Couto 6 r/c A, 1500 Lisboa
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara
Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RUS-143000
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino.
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Slovenio: Sonja Tavĉar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20., CH-2416 Les Brenets

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box 13445-747, Teheran
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603, CR-1000 San José
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Sud-Afriko: vakas
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara
Togolando: Afantchao-B.Yao, B.P.20225 Lome
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: d-ro Till Dahlenburg (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Bašić (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko*.

Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (+31 2209) 15 65.

Terminologio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, I-00155 Roma, Italio

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

KCE: Kultura Centro Esperantista, CP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.

Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. *Katalin Smidéliusz*, nia vicredaktoro, estas atingebla ankaŭ tra komputilreto. Ŝia adreso: smidik@fs2.bdtf.hu. Vi povas atingi la redakcion ankaŭ telefakse. (La teĥnikajn detalojn vi trovas en la Postparolo de la nuna numero.) Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitajn paĝojn. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.